der esperantist

Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR

24. Jahrgang | Nr. 148 (2/1988) | ISSN 001 4-0619 | 30 Pf

Pac-seminario en Helsinki

La finon de la Jubilea Jaro 1987 markis interalie notinda paŝo en la eksteraj rilatoj de Universala Esperanto-Asocio. La unuan fojon en sia preskaŭ 80-jara historio, la Asocio venis al interkonsento kun influa internacia organizaĵo, antaŭenigi la uzon de Esperanto en alia grava socia movado. Tiu atingo, grava en si mem, samtempe brile ilustras la kreskantan prestiĝon de la Internacia Lingvo, kiu frontas senprecedencajn eblecojn de disvastiĝo en la tujvenonta jardeko.

La 31-an de oktobro kaj 1-an de novembro, 1987, okazis komuna seminario en Helsinki, Finnlando, inter UEA kaj Monda Pac-Konsilio. MPK estas unu el la plej aktivaj kaj influhavaj internaciaj organizaĵoj en la monda pacmovado: ĝi kunlaboras kun i. a. Unesko, Unuiĝintaj Nacioj, la Movado de Nealiancitaj Landoj k. s., kaj ĝiaj landaj sekcioj ludas gravan rolon en la pormalarmadaj kaj kontraŭrasismaj movadoj en multaj landoj.

La seminario, sub la temo „Interhoma kompreniĝo, interpopola paco", celis esplori la komunaĵojn kaj diferencojn inter la Esperanto- kaj pacmovadoj. Tion ĝi faris tre sukcese, kun la partopreno de ĉ. 25 esperantistoj (inkluzive de la prezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin, la prezidanto de Mondpaca Esperantista Movado, d-ro Imre Pethes, kaj la prezidanto de Tutmonda Junulara Esperantista Organizo, Jan Koszmaluk) kaj deko da reprezentantoj de MPK (inkluzive de ties prezidanto Romesh Chandra). D-ro Tonkin emfazis, ke Esperanto ne estas celo en si mem, sed esenca rimedo por la egaleca diskuto de tutmondaj problemoj; kaj la redaktoro de „Esperanto", Mark Fettes, poste donis tre konkretajn argumentojn por la utilo de Esperanto al la pacmovado.

Siaflanke, s-ro Chandra elstarigis la rolon de rektaj homaj kontaktoj en kontraŭbatalo de la „bildo de la malamiko", ŝlosila faktoro en la ebligo de militismo kaj rasismo. Li elokvente pledis por granda koalicio de tiuj movadoj, kiuj laboras por pli paca kaj justa mondo, surbaze de komunaj interesoj kaj principoj.

Entute deko de referaĵoj kaj interaj diskutoj kondukis al la adopto de komuna interkonsento, fine de la dua tago. Ties ĝenerala senco estas, ke Monda Pac-Konsilio pli intense uzos Esperanton kaj aktive laboros por disvastigi ĝin, dum UEA donos pli da emfazo al la temo de paco en siaj kongresoj kaj eldonaĵoj, kaj instigos la esperantistojn pil vigle kaj funde diskuti ĝin. La fina dokumento enhavos sufiĉe detalan kunlabor-programon, kiu antaŭvidas i. a. internacian konferencon pri „Lingvo kaj Paco" en 1989, eventuale kun aŭspicio de Unesko.

[UEA]

Fina dokumento de Helsinki

1. Kompreniĝo inter individuoj estas esenca elemento en daŭra paco. Paco estas pli ol la neesto de milito: ĝi konsistigas ŝanĝon en la maniero, laŭ kiu la homoj pensas unu pri la alia, kaj tio siavice postulas kiel antaŭkondiĉon la kompreniĝon.

2. La elkreo de daŭra paco kaj antaŭenigo de malarmado proksime rilatas al (1) forigo de aliaj grandaj mondaj problemoj, inkluzive naturmediajn problemojn, malsaton, malsanon, analfabetecon, diskriminacion kaj militismon; (2) antaŭenigo de evoluo, kaj (3) kreado de egaleco, libereco, demokrateco kaj respekto al homaj rajtoj tra la tuta mondo.

3. Kompreniĝo postulas forigon de stereotipoj kaj antaŭjuĝoj, inkluzive la bildigon de aliaj kiel malamikoj, kaj ĝin oni plej bone atingas per rekta komunikado inter individuoj.

4. La manko de komuna lingvo estas granda obstraklo al komunikado. Ĝi malhelpas laboron por paco. La internacia lingvo Esperanto konsistigas gravan rimedon, per kiu eblas atingi rektan komunikadon, kaj ĝi povas esti signifa komunikilo por tiuj, kiuj laboras por paco.

5. Same tiel, la lingva komunumo de Esperanto povas konsistigi aparte efikan forumon por diskutado kaj medion por agado cele al internacia kompreniĝon kaj paco.

6. Per kreo de spirito de kompreniĝo inter homoj el ĉiuj landoj kaj vivosferoj, oni instigos kaj devigos la registarojn priatenti demandojn, kiuj rilatas al starigo kaj antaŭenigo de malarmado.

Sekve, la du organizaĵoj konsentas entrepreni la jenan agadon:

1. Ĉiu organizaĵo invitas la alian partopreni aŭ observi taŭgajn kunvenojn kaj konferencojn.

2. La du organizaĵoj konsentas kunlabori kadre de la Speciala Sesio pri Malarmado de la Ĝenerala Asembleo de UN en 1988 kaj por festi la 40an datrevenon de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj.

3. En la kadro de Unesko, la du organizaĵoj konsentas kunlabori en agadoj, kiuj rilatas al la Monda Jardeko por Kultura Evoluigo.

4. UEA ludos aktivan rolon en la konferenco de neregistaraj organizaĵoj pri elradikigo de la bildo de la malamiko, kiun organizos MPK kune kun aliaj neregistaraj organizaĵoj en Ĝenevo, februaron 1988.

5. UEA konsentas antaŭenigi la diskuton pri la temo de paco, kadre ankaŭ de la diskuto pri internacia kunlaboro kaj kompreniĝo, en ĉiuj siaj agadoj, inkluzive de la laboro je loka kaj landa niveloj; tiucele, kun helpo de MPK, ĝi publikigos taŭgajn diskutmaterialojn kaj distribuos ilin pere de siaj aliĝintaj kaj kunlaborantaj organizaĵoj.

6. UEA daŭre elstarigos la antaŭeniĝon de la paco, ekzemple per speciala Tago de la Paco en la Universalaj Kongresoj, kaj kune kun sia junulara sekcio, TEJO, daŭre emfazos tiun temon en ĉiuj taŭgaj konferencoj kaj de UEA kaj TEJO.

7. MPK konsentas traduki en Esperanton taŭgajn materialojn de MPK de tempo al tempo, kaj helpi pri ilia distribuo.

8. UEA konsentas traduki en Esperanton taŭgajn materialojn de MPK de tempo al tempo, kaj helpi pri ilia distribuo.

9. MPK kaj UEA kunlaboros pri agadoj sekvaj al ĉi tiu seminario, inkluzive de la ebleco organizi konferencon pri Lingvo kaj Paco en Parizo, 1989, al kiu aliaj neregistaraj organizaĵoj estos invititaj. Oni petos la subtenon de Unesko por tiu ĉi iniciato.

10. MPK kaj UEA kunmetos la referaĵojn el ĉi tiu seminario kaj aranĝos la publikigon de la plej reprezentaj referaĵoj en eldonaĵoj de la pacmovado kaj la Esperanto-movado.

La partoprenantoj esprimis la esperon, ke la baldaŭa pintkunsido inter Usono kaj Sovetunio konsistigos unuan paŝon al elimino de nukleaj armiloj kaj redukto de internacia streĉiteco.

Helsinki, 1 novembro 1987

Humphrey Tonkin:

Oni ne povas aliri la lingvan problemon en izolo

Kompreneble ekzistas tiuj, kiuj konsideras la lingvan problemon minora inter la grandaj internaciaj problemoj. Ofte niaj specialistoj pri internaciaj aferoj eĉ ne aludas ĝin en siaj listoj de ĉefaj internaciaj demandoj. Multaj tiuj fakuloj eĉ ne konsideras la internacian komunikadon grava problemo, malgraŭ tio, ke la lukto inter la grandaj ideologioj de la mondo daŭras, la nacioj nur pene sukcesas kunvivi pace eĉ en plej bonaj okazoj, kaj la internacia kunlaboro restas improvizita, primitiva, kaj ofte neadekvata al la bezonoj. Tie kie ekzistas internaciaj organizaĵoj por akceli tiun kunlaboron, la organizaĵoj estas ofte malestimataj aŭ tiel interne disdividitaj, ke ili ne kapablas decidan agadon.

La internacia komunikado ja ne estas celo en si mem, sed rimedo. Eble pro tio ĝi malofte menciiĝas en listoj, kiuj estas laŭ karaktero celaj. Tamen, kiel klare asertas la bjalistoka dokumento, „La demandoj de ekonomia evoluigo, de malarmado, de malsato, de malsano, de analfabeteco, de mediprotektado, k. s., postulas komunan kaj egalecan aliron pere de rekta komunikado en komuna lingvo." La aludo al egaleco estas grava: multaj mondaj problemoj ne estas solveblaj nur de la grandaj potencoj, sed postulas komunan, egalecan pritrakton. Esperanto metas ĉiujn homojn je la sama nivelo kaj do ebligas trakton de internaciaj problemoj en egala etoso — kontraste al la naciaj lingvoj, kiuj avantaĝas iujn kaj diskrimacias aliajn. Iasence, do, solvo de la lingva problemo, kaj de la problemo de internacia komunikado ĝenerale, estas antaŭkondiĉo por adekvata kaj daŭra solvo de aliaj problemoj mondaj.

La Deklaro de Bjalistoko, kvankam ĝi ne estas la unua dokumento, kiun la esperantistoj direktis al ŝtatestroj kaj aliaj aŭtoritatuloj, estas eksterordinare grava. Ĝi tuj sekvas alian elpaŝon faritan ne en formo de deklaro, sed en formo de rezolucio — rezolucion de la Ĝenerala Konferenco de Unesko, akceptitan fine de 1985, kiu rekonis „la grandajn eblecojn, kiujn Esperanto prezentas por la internacia kompreniĝo kaj la komunikado inter popoloj", kaj kiu rekomendis ĝian pli vastan utiligon en la internaciaj rilatoj kaj en la lernejoj. La rezolucio de Unesko estas signifa en tio, ke ĝi originis ekster la Esperanto-monvado, do en la formalaj politikaj rilatoj inter la ŝtatoj. La Bjalistoka Deklaro, tamen, pli klare ol iam ajn antaŭe, ligas la lingvan demandon senpere al aliaj grandaj problemoj inter la ŝtatoj kaj inter la unuopaj homoj.

Tra la jaroj, la Esperanto-movado larĝe diskutis tiun rilaton inter Esperanto kaj la pli vasta mondo de aferoj. Tiu estis temo de deklaro farita en la unua Universala Kongreso de Esperanto en 1905, kiu notis, ke Esperanto estas unuavice lingvo utiligebla por ĉiu ajn celo, do ne fenomeno kun specifa idea programo. Kvankam ekestis, precipe en la 20aj kaj 30aj jaroj de nia jarcento, organizaĵoj, kiuj utiligis Esperanton por pli-malpli specifaj politikaj celoj, la centraj strukturoj de la Esperanto-movado restis politike neŭtralaj. Kompare kun multaj aliaj sociaj movadaj, la Esperanto-movado relative bone sukcesis malhelpi, en la postmilitaj jaroj, ke aliaj, flankaj problemoj aŭ malsameco de politikaj opinioj ĝin dividu. Universala Esperanto-Asocio mem zorge evitis prenon de politikaj starpunktoj,kiuj ne rilatis al Esperanto: ĝia statuto klare proklamas ĝian neŭtralecon. Samtempe, la moderna UEA, pli multe ol en antaŭaj periodoj, estas preta engaĝiĝi en la debaton ne nur pri lingvoj, sed ankaŭ pri grandaj mondaj problemoj ĝenerale. Esperanto ja prezentas unike bonan rimedon, aŭ forumon, por fari tion.

Kvankam foje ni ŝatus imagi tion, politika neŭtraleco ne estas absoluta koncepto, sed ĝi praktikas principon de „pozitiva neŭtraleco": ĝi ne prenas

starpunkton pri demandoj ekster sia statuta kompetento, sed ĝi laŭpove ebligas liberan diskuton almenaŭ pri tiuj demandoj, kiujn eblas diskuti en libera forumo en difinita kunteksto. Tio ja estas nur praktika realigo de la ideo malantaŭ Esperanto — la ideo de internacia komunikado en egaleco. Eĉ pli esence, la Asocio konscias, ke oni ne povas aliri la lingvan problemon en izolo: ĝi estas rekte ligita al aliaj demandoj.

Efektive, lingvoj en si mem estas politikaj fenomenoj. La elekto de tiu aŭ alia lingvo en difinita politika aŭ socia sfero estas grava faktoro en la politikaj kaj sociaj rilatoj mem. Oficiala utiligo, ekzemple, de la angla lingvo, aŭ la franca lingvo, en ekskolonia lando, kiel lingvo de la registaro, povas ebligi partoprenon en la politika vivo nur al tiuj, kiuj konas tiun lingvon. Utiligo de indiĝena lingvo, aliflanke, anstataŭ favori difinitan ekonomian tavolon (kiel emas uzado de ekskoloniaj lingvoj), povas favori unu aŭ alian etnan grupon. Kia ajn estu la solvo, minimume tiu solvo metas ĉiujn personojn, kiuj ne regas la oficialan lingvon, en staton de dependeco je tiuj, kiuj ja ĝin regas. Multlingvismo ankaŭ ne solvas la problemon: ĝi estas multekosta kaj malfacile administrebla, kaj ofte ŝajnigas solvi situacion efektive ne solvitan ĉar ekzistas hierarkio de lingvouzo.

Rifuzo aŭ neeblo utiligi difinitan lingvon en difinita kunteksto povas facile forŝlosi personojn el partopreno. Tiel la lingvo fariĝas ilo de diskriminacio aŭ de ekskluzivado, kaj lingvaj diferencoj naskas reciprokan malamon aŭ suspektemon. Aliflanke, troa insisto pri la supereco de la propra lingvo, kiel unu elemento en politika aŭ kultura aŭ ekonomia supereco, povas konduki al subpremo aŭ milito.

Ĉion ĉi la esperantistoj komprenas pli bone ol multaj aliaj, ĉar ili ja daŭre studas la lingvan problemon kaj cerbumas pri ĝia efiko je la monda politiko. Pro tio ili pledas por neŭtrala solvo al la lingva problemo — neŭtrala en la senco, ke ĝi favoras neniun unuopan homgrupon, kvankam ĝi estas facile lernebla por ĉiuj. Nur en situacio maksimume senigita je la misa utiligo de potenco, kaj en situacio kie ne staras periloj kaj interpretiloj inter la homoj (ĉu en formo de lingvaj servoj, ĉu en formo de registaroj aŭ aliaj instancoj, kiuj malebligas senperan kontakton) povas okazi tiu vera kompreniĝo, kiu kondukos al la paca solviĝo de la multiĝantaj problemoj de la homaro, kaj al la kunlaboro ĉirkaŭ la bonaj perspektivoj, kiuj sin prezentas al nia socio. Jen, mallonge, la spirito de Bjalistiko, kiu donis novan impulson kaj novan esperon al nia Internacia Lingvo Esperanto.

Zamenhof-premio 1987 al UNICEF-direktoro

James P. Grant, ekde 1980 la Ĝenerala Direktoro de la Infan-Fonduso de Unuiĝintaj Nacioj (UNICEF), fariĝis la tria ricevinto de la Premio Zamenhof por Internacia Kompreniĝo en ceremonio de 11-a de decembro 1987 en Novjorko, Usono.
D-ro Grant plenumis gravajn postenojn en la usona registaro kaj en diversaj fakoj de UN, speciale koncerne internacian evoluhelpon. La organizaĵo kiun li nun gvidas, UNICEF, estas vaste estimata pro siaj klopodoj plibonigi la sano-, nutro- kaj edukostaton de infanoj tra la mnodo: laboro, kiu interalie gajnis por ĝi la Nobelpremion por paco en 1965.

La Premio Zamenhof estis kreita de UEA en 1985, kun la celo rekoni kaj subteni homojn, kiuj notinde kontribuis al la afero de internacia kompreniĝo kaj al realigo de la idealoj de la aŭtoro de Esperanto. Ĝis nun ricevis ĝin ankaŭ Robert Muller, asista ĝenerala sekretario de UN, kaj Amadou Mahtar M'Bow, iama ĝenerala direktoro de Unesko.

Romesh Chandra:

Nur per kunlaboro ni antaŭeniros

Unue mi diru, ke ni ĝojas kunveni kun Universala Esperanto-Asocio en la jaro de la Jubileo de Esperanto. Ni provis informiĝi kiel ebel plej funde pri viaj movado kaj Asocio. Kaj ni certe konsentus kun tio, kion diris antaŭ longe la fondinto de Esperanto- d-ro Zamenhof: „Malamikeco inter la nacioj, falu, falu — jam estas temp'!" Mi scias, ke ankaŭ hodiaŭ multaj esperantistoj uzas tiujn vortojn por emfazi sian sindediĉon al la afero de monda paco.

Mi kredas, ke lia kaj via tuta koncepto estas tre bone esprimita en tiu lasta deklaro de via 72a Kongreso en Varsovio. Vi kompreneble konsentas, ke la mondo ŝanĝiĝas. Ni vivas en epoko, kiam la danĝero de nuklea neniigo de ĉiuj homoj sur la tero estas pli granda ol iam ajn antaŭe. Oni devas ripetadi tion, ĉar la armiloj kiuj nun ekzistas kaj kiujn oni nun priesploras kaj preparas, estas de tute nova speco.

Sed samtempe kun la komenco de nia seminario plenigas nin nova espero. Ja estas viaj lingvo kaj movado aferoj de espero. Espero pri kio? Espero pri tio, kion via fondinto nomis la interligo de la manoj de ĉiuj popoloj en la strebado por paco ...

Hodiaŭ ni havas la novaĵon, ke la gvidantoj de la du grandaj potencoj renkontiĝos la 7an de decembro [1]). Ni deziras al ili ĉian sukceson. Kaj ni esperas, ke ĉie la popoloj faros ĉion eblan por insisti, ke estiĝu interkonsento por paco inter tiuj grandaj potencoj.

Sed mi tre forte samopinias kun tio, kion ĵus diris d-ro Tonkin, nome ke ne temas nur pri la grandaj potencoj — ke ili solaj ne povas alporti pacon al la mondo. Estas la tasko de ni ĉiuj kaj registaroj kaj popoloj.

Ni kredas, ke pli kaj pli da homoj kontraŭas la militon. Sed la milito, kiun ni ĉi-momento frontas, ne estas la milito de antaŭ cent jaroj, aŭ 40 jaroj, aŭ 30 aŭ 20 aŭ eĉ dek jaroj. Ni troviĝas en la nuklea kaj kosma epoko. Kaj ni kredas, ke tio postulas novan manieron pensi. Sekureco ne plu konsistas en la havo de nukleaj armiloj, nek en preparoj fari la unuan baton, kiel kredis potencaj registaroj antaŭ nur du aŭ tri jaroj. Tiu unua bato estus la lasta bato. Antaŭ nur kelkaj jaroj ni kutimis diri, ke tiu unua bato kondukus al la dua bato, kaj sekve al la tria, kaj poŝtupe la mondo detruiĝus. Sed hodiaŭ la sciensistoj de Usono, de Sovetunio kaj de ĉiuj landoj estas tute certaj, ke la uzo de nukleaj armiloj kondukus al la tiel nomata nuklea vintro. Kio signifas simple, ke la sunlumo estus forbarita de la tero. Kaj tio signifas, laŭ esprimo de la nobelpremiitaj Internaciaj Kuracistoj por la Prevento de Nuklea Milito: Tiuj, kiuj mortus poste, dezirus esti mortintaj la unuaj. Ĉar ĉiuj ja mortus.

Jen kial ni bezonas tute novan aliron al niaj problemoj. La sekureco de iu flanko estas certigebla nur per la sekureco de ĉiuj. Tial la tuta aliro al armiloj, tiel nomata sindefendo, estas ŝangenda. Oni devas rigardi la sekurecon afero ne nur armila, sed ankaŭ ekonomia, politika, ekologia, humanisma ... Ĉiuj problemoj bezonas komunan aliron. Ekzistas nur unusola strebo.

Ni diras ne nur, ke ni ne volas morti, sed ankaŭ ke ni ne volas, ke aliaj homoj mortu. La plej granda movado de Eŭropo kaj Norda Ameriko estis tiu, kiu kolektis monon por la malsatmortantoj en Afriko. Kaj la pacmovado diras, ke ankaŭ la mondo devas ne morti — hodiaŭ aŭ morgaŭ. Iuj konsideras nin movado de timuloj. Jes, ni timas. Ni timas la detruon de la mondo. Sed estas ni, kiuj havas la plej grandan optimismon: ĉar ni kredas, ke eblas mondo sen nukleaj armiloj, sen malsato, sen malriĉo.

Tial ni kredas, ke ni komencas vidi la unuajn fruktojn de nia multjara batalo en la malpermeso, la elimino de mezkaj malplilongdistancaj raketoj pere de traktato, kiun oni espereble subskribos en decembro [1]). Estas nia espero, ke ĉi tiu pintkunsido kondukos ne nur al la subskribo de ĉi tiu historie grava traktato, sed ankaŭ malfermos la pordon al la subskribo de aliaj interkonsentoj por la malpliigo de la strategiaj raketoj je 50 procentoj, por la

malpermeso kaj ĉesigo de ĉiuj atombombaj testoj, por tio, ke la kosma spaco estu uzata nur por pacaj celoj kaj neniam por milito, por la malpermeso de kemiaj armiloj. Kaj ni pluiru al la malpliigo kaj poste, ni esperu, al la elimino eĉ de konvenciaj armiloj. Ĉio ĉi estas ebla.

Antaŭ iom da tempo homoj diradis: „Ni volas forigi nukleajn armilojn, sed tio ne povos okazi." Se ni povos certigi kaj devigi la grandajn potencojn subskribi ĉi tiun traktaton en decembro, tio ja konsistigos la unuan paŝon en la historio por elimini nukleajn armilojn.

Ni kredas, ke nova aliro al la problemoj de paco realiĝas ĉie inter la popoloj. Ni bezonas grandan koalicion de ĉiuj, kiuj deziras interkomprenon kaj pacon. Ĉiu el ni havas propran vidpunkton, kaj ni devus fieri pri tio, ĉar ĉiu organizaĵo — el milmiloj — kontribuas al paco laŭ sia propra maniero. Sen ĉiu el ili, ni ne antaŭenirus. Ni havas vastajn movadojn, kiuj kontraŭluktas la rasismon, la apartismon. Tiuj movadoj kreskas; sed ili ne venkos solaj. Estas vastaj movadoj, kiuj celas nur la malarmadon; sed ni ne atingos malarmadon, se ĉiuj ne kuniĝos kaj miatakse, tio, kio gravas nun, estas ke ĉiuj organizaĵoj komencas vidi, ke ekzistas nur unusola strebo, kaj ke eblas kune venki.

Tial mi konsideras ĉi tion tre grava okazaĵo por Monda Pac-Konsilio. Nuntempe, ni bezonas aŭskulti unu la alian.

Je la 9a kaj 10a de februaro 1988, grupo de internaciaj neregistaraj organizaĵoj organizas gravan konferencon en Ĝenevo. Temas pri ses invitantaj organizaĵoj, tre gravaj, tre malsimilaj unu de la aliaj: la Monda Eklezia Konsilio, la Monda Federacio de UN-asocioj, la Monda Veterana Federacio de ĉiuj militpartoprenintoj, la Internacia Ligo de Virinoj por Paco kaj Libero, la Internacia Demokratia Federacio de Virinoj, la Internacia Junulara-Studentara Movado por UN kaj la Monda Pac-Konsilio.

La temo estas: „Kiel elradikigi la bildon de la malamiko." La tuta amaskomunikilaro de certa speco plenplenas ĉiutage je bildoj pri aliaj landoj, aliaj popoloj kiel malamikoj. Mi ne scias, ĉu vi spektas ĉi tiujn filmojn — mi mem ne, sed mi aŭdis pri ili; estas iu nomata Rambo. Mi ne kontraŭas, ke iuj ŝatas vidi homojn pafi unu la alian. Tio estas ilia afero. Mi mem ne ŝatas ĝin, ĉar mi estas pacifisto. Sed kion montras tia fimo? Ĝi montras, ke tuta popolo kiun ĝi malŝatas estas subnivela. Mi memoras, kiam ni aŭdis ke usonaj soldatoj eniris vilaĝon en Vjetnamio kaj mortigis ĉiujn: My Lai [2]). Kiel oni povis fari tion? Kiel tio eblis? Dum jaroj oni trejnis ĉi tiujn junajn homojn, bonajn junulojn kiuj kredis, ke ili batalas por sia lando, oni plenigis iliajn mensojn per la ideo, ke la vjetnamo estas subhomo, kvazaŭ besto kiun oni devas ĉasi.

Kaj hodiaŭ — tio okazis antaŭ longe; tie ne temis pri nukleaj armiloj. Hodiaŭ oni pravigas nukleajn armilojn per tio, ke ni frontas malamikon kies popolo volas detrui la mondon aŭ konstrui socion, kiu kontraŭas la interesojn de nia popolo. La bildo de la malamiko io, kion ni devas kontraŭbatali. Mi kredas, ke en tiu konferenco, por kiu kunlaboras multaj organizajoj, estus tre grave prezenti la grandan rolon, kiun ludas Universala Esperanto-Asocio en la konstruo de interkompreno. Ĉar konstrui interkomprenon estas batali kontraŭ la bildo de la malamiko. Ankaŭ kadre de la Monda Jardeko de Kultura Evoluigo, por kiu alvokis Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko, kaj la Tria Speciala Sesio pri Malarmado ĉe UN, kiu okazos 1988, ni tre ŝatus daŭrigi nian kunlaboron kun UEA. La granda avantaĝo de ĉi tiuj agadoj estas tio, ke ĉiu povas prezenti sian propran starpunkton. Tial ni kredas, ke ili ne atencas la statuton aŭ la limojn de iu ajn organizajo. Oni ne ĉeestas por subteni ion preter siaj propraj celoj, sed por prezenti siajn proprajn kredojn, kaj, se tio koncernas nin, eĉ pli por aŭskulti aliajn.

Kredu aŭ ne, kiam ni aŭskultas, ni trovas ke ni samopinias. Por la plimultaj aferoj ni ĉiuj troviĝas ĉe la sama flanko.

[1]) Chandra faris sian prelegon la 31-an de de oktobro 1987. La Red.

[2]) En GDR konata kiel Son My.

Rekomendoj de la 21-a Konsultigo

La Konsultiĝo rekomendas:

— al la landaj Esperanto-Asocioj partoprenigi siajn aktivulojn en KIK [1]) (organizata en Poprad) inter la 18-a ĝis la 30-a de aŭgusto 1988 cele plialtigi ilian kvalifikon kaj ke ili sendu almenaŭ 5 — 7 plejparte junajn aktivulojn, kaj proponu prelegantojn por la sekvontaj jaroj.

— al ASE [2]) organizi en Sovetunio la 22-an Konsultiĝon en la jaro 1989,

— esplori la eblecojn de la reciproka ekonomia kunlaboro kadre de SLEAJ [3]),

— utiligi la ŝtatajn kulturcentrojn en la socialismaj landoj por Esperanto-aranĝoj,

— al ĈEA [4]) (kunlabore kun UEA) organizi internacian korespondan kurson pri terminologio kaj normigado en Esperanto,

— al SLEAJ organizi kursojn de Esperanto por fremdlandaj civitanoj en la koncernaj landoj portempe loĝantaj,

— diskuton interne de la Esperanto-asocioj pri la celoj kaj funkcioj de la Monda Esperanto-Centro fondota en Bjalistoko kaj esploron de la ebleco kolekti monon por tiu celo. Surbaze de la diskutoj oni esploru la eblecojn de financa kaj aliformaj kontribuoj al efektivigo de la ideo,

— al SEA [5]) organizi la 7-an Internacian Metodikan Seminarion en la jaro 1989,

— al SLEAJ interesigi kaj laŭeble finance subteni siajn fakulojn por kunlabori kun la Termuinologia Esperanto-Centro, aparte kun ties terminografiaj komisionoj.

— La JS-oj [6]) de la partoprenantaj partneroj proponas kolektive:

a) subteni la 1-an Junularan Esperanto-Renkontiĝon de GDREA[7]), per sendo de po 3 delegitoj, aktiva partopreno kaj per diversaj kontribuoj al la programo,

b) intensigi la liveradon de materialoj, spertoj kaj informoj de la JS-oj al KEA [8]) por helpi al la agado de la juna esperantistaro en KEA,

c) ke LSoj helpu revigligon de la Konsultiĝoj de JS-oj de SLEAJ. Por 1988 SEA esploru eblecon inviti JS-oj al la konsultiĝo. Por 1989 invitas GDREA. Precizajn informojn GDR donos dum la 22-a Konsultiĝo de SLEAJ en 1989.

— esplori la eblecon disvastigi Esperanton inter sportistoj,

— al PEA [9]) kontakti TEC [10]) por esplori la eblecon ligi TEC al la fondota Monda Esperanto-Centro,

— ke la LS-oj esploru eblecojn pri partopreno de JS-anoj en la Monda Festivalo de Junularo kaj Studentaro, kiu okazos en la jaro 1989 en Popoldemokratia Republiko de Koreujo.

Mallongigoj:

[1]) KIK — Konstanta Internacia Kvalifikejo, kiu transiris de Pisanica al la Internacia Kultura kaj Kleriga Centro en Poprad/ČSSR,
[2]) ASE — Asocio de Sovetiaj Esperantistoj,
[3]) SLEAJ — Socialismalandaj Esperanto-Asocioj,
[4]) ĈEA — Ĉeha Esperanto-Asocio,
[5]) SEA — Slovakia Esperanto-Asocio,
[6]) JS-oj — Junularaj Sekcioj,
[7]) GDREA — Esperanto- Asocio en Kulturligo de GDR (— GDR-Esperanto-Asocio, prononcu Godorea),
[8]) KEA — Kuba Esperanto-Asocio,
[9]) PEA — Pola Esperanto-Asocio,
[10]) TEC — Terminologia Esperanto-Centro [de UEA]

Dankletero de Roman Malinowski

La Alta Protektanto de la 72a Universala Kongreso de Esperanto, la prezidanto de la Pola Parlamento (Sejm), s-ro Roman Malinowski, sendis jenan leteron al la redakcio de „der esperantist":

„Finiĝas la solenado de la Jarcento de la Internacia Lingvo Esperanto en Pollando kaj en la mondo. La apogeo de la celebrado de ĉi tiu datreveno estis la 72a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio, kiun akompanis aliaj kongresoj, konferencoj kaj fakaj renkontiĝoj en diversaj urboj de Pollando, i. a. Bialistoko, la naskiĝurbo de la Kreinto de Esperanto d-ro L. L. Zamenhof.

[daŭrigo p. 33]

11-a Ĝenerala Konferenco de Mondpaca Esperantista Movado

La hungara ĉefurbo Budapeŝto gastigis de la 29-a de aprilo ĝis la 1-a de majo 1988 la partoprenantojn de la 11-a Ĝenerala Knoferenco de la Mondpaca Esperantista Movado (MEM). El 18 landoj ĉeestis entute 186 partoprenantoj la gravan konferencon. GDREA delegis tripersonan oficialan delegacion al la partopreno en la MEM-konferenco: **Hans-Jürg Kelpin** (Erfurt), prezidanto de la MEM-Sekcio de GDR; **Joachim Schulze** (Leipzig), membro de la prezidio de la Centra Estraro de GDREA; kaj d-ron **Hans Rogazewski** (Ilmenau), prezidanto de la Distrikta Estraro Suhl.

La MEM-konferenco de Budapeŝto havis la taskon bilanci la ĝisnunan laboron kaj tiri konkludojn por la estonteco. Krome estu elektata nova Internacia Komitato de MEM. Dum la solena inaŭguro, kiu okazis sabatan, la 30-an de aprilo, en la Kulturcentro „Lang", ankaŭ alparolis la protektanto de tiu ĉi konferenco, la prezidanto de la Hungara Packonsilio, prof. d-ro **Lásló Sztanyik**. La reprezentanto de UEA, prof. **Ottó Haszpra**, salutis la internacian partoprenantaron, substrektante, ke UEA havas pozitivan starpunkton rilate al mondpaco. „Kvankam ne ĉie en la mondo silentas la armiloj, ni esperas, ke la kontaktoj de la superpotencaj ŝtatoj helpas fortikigi la pacon", diris la UEA-reprezentanto. D-ro **Arpád Ratkai,** vicprezidanto de Hungara Esperanto-Asocio, aldonis: „La sorto de Esperanto dekomence estas strikte ligita kun la paco!"

La inaŭguron sekvis la raportoj de la prezidanto de MEM ,d-ro **Imre Pethes**, kaj de la ĝenerala sekretario, **Clément Tholet**. Pri la laboro de la redakcio de la gazeta organo de MEM, „Paco", raportis ties ĉefredaktoro **Violin Oljanov**. Dum la tempo, kiu estis destinita al alparoloj de la partoprenantoj, ankaŭ pastoro **Hans-Jürg Kelpin**, prezidanto de la GDR-a MEM-Sekcio, kaptis la okazon informi pri la porpacaj agadoj de la esperantistoj de GDREA. Antaŭe la delegacio de GDR disdonis kopiojn de la raporto al la 11-a Ĝenerala Konferenco de MEM. En tiu ĉi raporto interalie tekstas jene: „Laŭ la Gvidlinioj de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR (GDREA) la tuta asocio rigardas sia devo la utiligon de Esperanto en la servo de la paco. Agante laŭ tio, la agado por la paco estas esenca komponanto de la tuta aktivado de la membroj de GDREA (...) Laŭ sugestoj de la MEM-Sekcioj en la kadro de distriktaj aranĝoj ludis rolon porpacaj konkursoj. Ekzemple en Schwerin, dum la ‚Jaro de la Paco', estis lanĉita aparta belarta konkurso pri pactemoj. La distrikta estraro de GDREA en Karl-Marx-Stadt organizis internacian artan konkurson por infanoj sub la temoj ‚Ni infanoj ŝatas la pacon' kaj ‚Konservu la pacon por infanoj'. La materialoj ricevotaj estos eksponataj dum la 8-a tutrespublika renkontiĝo de la pionirorganizo de GDR (. . .)"

La posttagmezo de la dua konferenca tago apartenis al kunsidoj pri redaktoraj, virinaj kaj organizaj aferoj. En la redaktora kunveno senescepte temis pri la plibonigo de la MEM-organo „Paco". Bazo de la diskutado estis ellaborajo de la prezidio de GDREA, kiun prezentis **Joachim Schulze**. Tiu ellaborajo tre kritike prilumas la enhavon, la redakcion kaj la grafikan aranĝon de la revuo „Paco". Interalie la GDREA-starpunkto estas tia: „La revuo komprenu multe pli larĝe la temon ‚paco'. En la nuntempo la konservon de la paco koncernas multaj espektoj, ekonomiaj, politikaj, kulturaj, filozofiaj, militteknikaj, edukaj kaj aliaj (. . .) Estus imageblaj teme orientitaj kajeroj laŭ la modelo de ‚Unesko-Kuriero'. Tio signifas: En ĉiu numero estu traktata iu ĉefa temo, ekzemple rasismo, monda nutrado, monda sano, eduko al toleremo k.s. (. . .) La grafika aranĝo nepre moderniĝu! Aktuale ĝi estas tre antikva (. . .)"

Tiun ellaborajon, el kiu ni jus citis, unuanime akceptis la kunvenintoj kaj

la ĝenerale sekretario de MEM, **Clément Tholet**, pri tio informis la plenkunsidon de la konferenco.

Dimanĉon, la 1-an de majo 1988, grupo de delegitoj sekvis la inviton partopreni kiel honoraj gastoj la demonstracion de la budapeŝtanoj en la **Népstadion**-strato. Inter la tiel honoritoj estis la tripersona oficiala delegacio de GDREA, kiu ricevis lokon sur la tribuno. Per laŭtparoliloj oni informis la demonstraciantojn de Budapeŝto, ke troviĝas honoraj gastoj de la 11-a Ĝenerala MEM-Konferenco sur la tribuno. Dum du horoj preteriris kelkaj centmiloj da homoj, feste vestitaj, en festtaga humora. Por eksterlandanoj tiu maja demonstracio estis nepre profunda travivaĵo.

La ĉefurbaj esperantistoj starigis grandan tendon en parkon, kie promenis miloj da budapeŝtanoj post la maja manifestacio. Antaŭ la tendo la esperantistoj proponis „instrui" al ĉiu ajn dum kvin minutoj iom da Esperanto . . . tiun proponon dum nia ĉeesto kaptis multaj homoj.

La dimanĉa posttagmezo denove estis konferenca. Raportis la estroj de la unuopaj kunvenoj, alparolis denove partoprenantoj, estis resumita la debato per la MEM-prezidanto. Post konfirmo de la proponoj kaj rezolucio okazis la novelekto de la Sekretario kaj de la Internacia Komitato de MEM. La sekretariaton gvidos denove Clément Tholet kiel ĝenerala sekretario. D-ro Imre Pethes estis reelektita prezidanto de MEM. El GDR apartenas nun al la Internacia Komitato kvar esperantistoj: **Hans-Jürg Kelpin**, prezidanto de la GDR-a MEM-Sekcio; **Rudolf Hahlbohm**, vicprezidanto de la Centra Estraro de GDREA; **Ingrid Mewes**, membrino de la Centra Estraro de GDREA; kaj **d-ro sc. Detlev Blanke**, sekretario de la Centra Estraro de GDREA.

Cetere, krom la oficiala delegitaro de GDREA ankaŭ ĉeestis la konferencon granda grupo de esperantistoj el la distrikto Karl-Marx-Stadt, kiu aktive partoprenis la kunvenojn — tion oni, bedaŭrinde, ne povas diri pri kelkaj alvojaĝintaj esperantistoj el el aliaj landoj. Tre ofte la estraro de la konferenco devis peti pri partopreno en la unuopaj kunvenoj, ofte eĉ vane! Dum la elektoj la partoprenantaro malpliiĝis al triano — hontinda afero. El nia vidpunkto la konferenco ne estis bone organizita, ofte mankis informoj pri la sekvaj programeroj. Tial enŝteliĝis sendiciplineco en la delegitarojn. El tio la MEM-Sekretariato nepre tiru konkludojn por sekvontaj konferencoj de pacbatalantaj esperantistoj. Ĝeneralaj Konferencoj de MEM estas tro gravaj por rigardi ilin kiel amuzajojn.

Lasta informo: La Internacia Komitato de MEM atribuis la „Honoran Insignon de MEM" al GDREA pro la elstara redakta laboro okaze de la eldono de la GDR-a „Paco". Kaj tiun laboron plejmulte solvas d-ro sc. Detlev Blanke, do honorigo de lia internacia laboro! Ni gratulas!

Joachim Schulze,

11-a LEA-renkontiĝo

La bela tradicio, ke renkontiĝis iamaj membroj de la Germana Laborista Esperanto-Asocio, estis daŭrigata ankaŭ 1988.

La 11-a renkontiĝo okazis tuj post pasko, de la 4-a ĝis 6a-- de aprilo 1988 en la luksa gastdomo kaj seminariejo de Kulturligo en Bad Saarow. Partoprenis 32 veteranoj. La programo denove estis abunda kaj varia. Inter alie oni aŭskultis sonbende partojn de la inaŭguro de la 72-a Universala Kongreso (la paroladon de prof. Tonkin), diskutis pri la rezultoj de la jubilea jaro internacie kaj en GDR, rigardis diapozitivojn pri Francio kaj Kubo, aŭskultis la germanlingvan radioscenaĵon „La revo de d-ro Zamenhof" kaj interŝanĝis memorojn kaj spertojn. Kun intereso la partoprenintoj vizitis la memorejojn pri Maxim Gorki (kiu dum la dudekaj jaroj restadis en Bad Saarow dum 8 monatoj) kaj pri Johannes R. Becher. „de"

[daŭrigo de p. 31]

Multaj miloj da partoprenintoj omaĝis nian Grandan Samlandanon, kies verko praktike servas al la realigo de la interkompreniĝo inter la multnombraj amikoj de nia Patrujo kaj kontribuis al la profundigo de la sentoj de simpatio kaj amikeco al nia popolo.
Mi esprimas al Vi mian tutkoran dankon kaj mian altan rekonon pro la eminenta kontribuo al la realigo de la jubilea programo.

Roman Malinowski
La Alta Protektanto
de la 72a Universala Kongreso"

Kio estas F. E. T.?

F. E. T. estas asocio laŭleĝe agnoskita, kies plena nomo estas „Fédération Espérantiste du Travail" (Esperantista Federacio de Laboro). Ĝia sidejo estas en Parizo.

F. E. T. celas propagandi Esperanton inter la laboruloj kaj uzi ĝin kiel instrumenton serve al paco, socia progreso kaj socialismo. Konkrete ĝi propagandas la ideon de la internacia lingvo inter la manlaboruloj kaj intelektuloj, en la progresistaj politikaj, sindikataj, kooperativaj kaj kulturaj medioj. Ĝi organizas laŭeble la instruadon de Esperanto en tiuj medioj. Aliflanke F. E. T. orientas siajn membrojn al praktika uzado de Esperanto serve al la ĉi-supraj celoj kaj partoprenas en la bataloj por paco, liberecoj, demokratio, socia progreso. Krome, ĝi ankaŭ alvokas la ceterajn esperantistojn kaj esperantistajn asociojn partopreni en tiuj bataloj.

Fakte, F. E. T. sin turnas al ĉiuj franclingvaj landoj, al ĉiuj esperantistoj, kiuj komprenas la francan lingvon. Ĝi eldonas gazeton, kies titolo estas „Le Travailleur Espérantiste (La Esperantista Laborulo). Tiu gazeto regule aperas jam de longa tempo, 10-foje en jaro. Parto estas verkita franclingve, parto en Esperanto. Franclingvaj artikoloj principe celas montri al neesperantistaj legantoj kio estas F. E. T. (politike) kaj kio estas Esperanto, aŭ kion oni povas fari per Esperanto.

En 1987, okaze de la 100-a jubileo de Esperanto, F. E. T. havis aparte gravan aktivecon kaj atingis sufiĉe gravajn sukcesojn. Artikoloj aperis en komunistaj gazetoj, notinde „l'Humanité", en la revuoj „France-Bulgarie", „Combat pour la Paix" (organo de l'pacmovado), k.a.... En „La Vie Ouvrière" (organo de l'sindikato C. G. T.) aperis tre bona, 3-paĝa artikolo, kiun poste republikigis „Les Nouvelles de Moscou". Oni devas rimarki, ke ĝis nun venis neniu rebato kontraŭ Esperanto, kontraŭe al tio, kio okazis kelkfoje antaŭ kelkaj jardekoj ...

Estas necese substreki, ke la politika pozicio de F. E. T. ne estas fremda al tiu ŝanĝo. F. E. T. estas la sola esperantista asocio en kapitalisma lando, kiu troviĝas flanke de la laboruloj en iliaj klasbataloj kaj flanke de la pacdefendantoj, sen iu ajn kompromitiĝo kun la ideoj propagandataj de la grandburĝaro. Krome, ĝi ne uzas utopiajn argumentojn en sia poresperanta propagando.

Aparte grava estis la serio da prelegoj fare de k-do D. Blanke, dum 2-semajna restado en Francio, [15. — 29. 11. 1987] laŭ iniciativo de F. E. T. Ili estis tre solida fakto favore al Esperanto unuflanke kaj al F. E. T. aliflanke, pro lia scienca, altnivela argumentado. Kvankam ankoraŭ ne tre grava asocio laŭ la nombro de siaj membroj, pro la nuntempaj malfacilaj kondiĉoj en Francio, F. E. T. rajtas esperi, ke venos al ĝi pli kaj pli da klaskonsciaj kaj pacamantaj esperantistoj, adeptoj de la „nova pensmaniero" en la internaciaj rilatoj, ĉar ĝi situas sur la vojo kondukanta al justa kaj senmilita socio.

(Prezo de la abono al „Le Travailleur Espérantiste" [ekster Francio]: 60 ff por unu jaro.)

La adreso de FET: Fédération Espérantiste du Travail, 179, rue Ordener, 75018 — Paris, Francio,

William Gilbert

Plenkunsido de la CE de GDREA

Post la reelektoj la dua plenkunsido de la Centro Estraro de GDREA okazis la 22/23. 1. 1988 en Hoyerswerda, distrikto Cottbus.

Laŭ la tagordo la partoprenintoj resumis la rezultojn de la jubilea jaro, larĝe diskutis problemojn, kiel pliefikigi la aktivadon de la Centra Estraro, pritraktis la situacion de la junulara agado kaj interŝanĝis spertojn pri la plibonigo de la praktika agado ĉe la bazo. Oni krome aŭskultis diversajn raportojn kaj informojn.

Prelegoj en Francio

La Federacio de Laboristaj Esperantistoj de Francio (Fédération Espérantiste du Travail, FET) estas progresema organizaĵo, kiu aktivas en MEM kaj estas ankaŭ bone konata en GDR. Diversaj membroj jam vizitis GDR kaj havas bonajn rilatojn al membroj de GDREA. Al la plej konataj aktivuloj sendube apartenas William Gilbert (kp. „der esperantist", 145 [5/87], p. 118) la nuna prezidanto de FET kaj Gilbert Gerrier kun sia edzino Antoinette. Gilbert Gerrier ankaŭ redaktas la organon de FET, „Le Travailleur Espérantiste". FET invitis min okaze de la jubilea jaro al prelegvojaĝo de la 15-a ĝis 29-a de novembro 1987. La programo estis sufiĉe densa kaj multflanka.

1. Mi havis la eblecon renkontiĝi kun la ĝenerala sekretario de la Franca Packonsilantaro, Daniel Cirora kaj estis akceptita de la urbestra asistanto de Saint Denis. Dum ambaŭ kunvenoj mi konatiĝis kun la laboro kaj specifaĵoj de la franca pacmovado kaj informis pri la agado de Kulturligo kaj de ĝia Esperanto-asocio. Tio eble iom kontribuis el la konvinko de la kameradoj, ke Esperanto estas utila instrumento por la pacagado.

2. Tre utila estis la renkontiĝo kun la prezidiano de la UNESKO-Komisiono de GDR, d-ro Helmut Tautz, kiu restadis en Parizo partoprenante la 24-an Ĝeneralan Asembleon de UNESKO. La renkontiĝon organizis d-ro François Lo Jacomo. D-ro Tautz faris multajn valorajn proponojn pri la kunlaboro inter UEA kaj UNESKO.

3. En interlingvistikaj rondoj estas konate, ke la mondfama franca lingvisto, André Martinet dum la 40-aj jaroj aktive okupiĝis pri la planlingva demando kaj verkis diversajn studojn kaj recenzojn pri la temo. D-ro Lo Jacomo kaj mi pre-paris kelkajn demandojn por intervjui la profesoron. La 17-an de novembro 1987 ni havis la eblecon. La interesega intervjuo estas registrita sonbende.

4. Dum mia restado en Francio mi faris entute 10 prelegojn: Universitato Sorbonne en Parizo: „Nova scienca branĉo — interlingvistiko"; kulturdomo de Dijon (Esperanto-Klubo): „Argumentado kaj informado pri Esperanto"; Esperanto-Klubo Orleans: „Esperanto-movado kaj pacmovado"; Esperanto-Klubo Angers: „Argumentado kaj informado pri Esperanto"; Esperanto-Klubo Troyers: „Antaŭjuĝoj kontraŭ planlingvoj"; universitato Aix-en-Provence: „Evoluo, stabileco kaj normo de Esperanto" kaj „Nova scienca branĉo — interlingvistiko"; Esperanto-Klubo en Aix-en-Provence: „Pri la lingvo-politika rolo de d-ro Zamenhof"; urba teatro en Choisly-le-Roi: „Esperanto-movado kaj pacmovado".
   Partoprenis inter 25 — 40 personoj (en Sorbonne 80) kaj ĉiam sekvis tre vigla debato. Mi parolis en Esperanto kaj estis tradukita francen.

La restado en Francio estis multrilate interesa. Ne nur la reagoj al la prelegoj estis por mi, kiel ĉiam, agrablaj kaj instruaj. Mi pli bone konatiĝis kun la laboro de FET, entute lernis pli bone kompreni la specifaĵojn de pluralisma Esperanto-movado sub okcidenteŭropaj kondiĉoj. Aparte interesa estis por mi konatiĝi kun la politika klimato en Francio, kun la pozicio de la Franca Komunista Partio. Mi tre bone fartis inter kamaradoj kaj afablaj esperantistoj, kaj tion dankas al la membroj de FET kaj aliaj esperantistoj, unuavice al Gilbert kaj Antoinette Gerrier, sed ankaŭ al William Gilbert, Gérard Requigny, Robert Laudereau, Claude Giquel, Maurice Mergier, Pierre Jouvin, André Frangeul, Petro Cugny, s-ro Reynaud kaj aliaj.

D. Blanke

Unua kongreso de Kuba Esperanto-Asocio

Kubanoj ekaktiviĝis

Dum la lasta tempo la tutmonda Esperanto-movado havis okazon ekatenti pri nove impete evoluanta movado, en Kubo. Kuba Esperanto-Asocio, kiu estis fondita en la jaro 1979, aliĝis al Universala Esperanto-Asocio 1983 en Budapest. Kubaj reprezentantoj partoprenis la kongresojn 1984 en Vankuvero, 1985 en Augsburg, 1986 en Pekino kaj kompreneble 1987 en Varsovio. 1985 unuan fojon kuba reprezentanto partoprenis konsultiĝon de Esperanto-asocioj de socialismaj landoj, nome la 18-an en Pisanica/Bulgario (Andres Piñera Prieto). 1987 aperis jubilea poŝtmarko. Samtempe aperis tri libroj en Esperanto: „La historio absolvos min" (Fidel Castro), „Kuba Ŝtata Organizo" (Domingo García Cárdenas) kaj la romano „La lasta virino" (Manuel Cofiño). Ili aperis en la fremdlingva eldonejo José Martí. La Kuba Akademio de Sciencoj patronas la organizaĵon. Kompreneble la evoluo de la Esperanto-movado en Kubo estas tre grava evento, ne nur por Kubo sed entute por Latina Ameriko.

1-a Kongreso

Pro tio mi estis tre feliĉa pri la invito de la Eldonejo José Martí kaj Kuba Esperanto-Asocio viziti la insulon de la sukerkano kaj de la palmoj inter la 4-a ĝis 12-a de decembro 1987. De la 4-a ĝis 6-a de decembro okazis en Havano la unua kongreso de Kuba Esperanto-Asocio. Partoprenis pli ol 600 kubanoj. La meza aĝo estis 34. La plej juna kongresanino, Adanis Velázquez, fariĝis 12-jara, ĝuste dum la kongreso. El eksterlando ĉeestis krom mi la ĝenerala direktoro de UEA, Simo Milojeviĉ (centra oficejo Rotterdam), prof. d-ro Otto Haszpra (vicprezidanto de Hungara Esperanto-Asocio kaj estrarano de UEA) kaj Marin Bacev, ĉefmetodikisto de Bulgara Esperanto-Asocio. Prof. Haszpra havis unumonatan oficialan laboron en la Teknika Universitato de Havano. Marin Bacev gvidis kelkajn Esperanto-kursojn, kaj Simo Milojeviĉ sondis la eblecojn de eventuala Universala Kongreso 1990 en Havano.

La tuta kongreso okazis en Esperanto. La lingva nivelo de multaj kubaj esperantoj, kun kiuj mi havis la okazon paroli, estis sufiĉe bona, eĉ tre bona. Konsiderante, ke la plej multaj el ili parolis unuan fojon kun eksterlandano, mi estis tre impresita. Kompreneble, multaj devas kontraŭbatali la emon forgluti (aŭ tute ne prononci) la sonon ‚s', influo de la hispana lingvo. La malfermon partoprenis kelkaj eminentaj funkciuloj, inter ili Lucía Sardiñas, estrino de la eldoneja fako de la Centra Komitato de Kuba Komunista Partio, Eulogio Rodriguez Millares, prezidanto de la ŝtata oficejo pri kongresoj, kaj Felix Sautié-Mederos, direktoro de la fremdlingva eldonejo José Martí. La ferman kunsidon ankaŭ partoprenis la vicministro pri kulturo, Abel Prieto. La alparoloj dum la malferma aranĝo, aparte la estrara raporto, prezentita de la prezidanto de KEA, Jesús A. Castillo Jiménez, montris, ke KEA havas tre klaran imagon pri la irenda vojo, ligita al la kuba socialisma socio kaj samtempe malferma al la mondo. Raul Juaréz Sedeño prezentis historian skizon pri la evoluo de la Kuba Esperanto-movado. Ekzistas jam atentindaj sukcesoj: la Zamenhof-lernejo sub profesia gvido de Andres Piñera disvastigas Esperanton en Havano kaj krome helpas al aliaj kursoj. En 10 provincoj oni instruas Esperanton en 26 lernejoj, kiun 1987 finis 1 200 lerantoj. En la ĉeforgano de la partio „Granma" aperis longa artikolo okaze de la jubileo. Rario-disaŭdigoj ne estas maloftaĵo. KEA aktuale havas 1 300 membrojn. La eksterlandaj gastoj prezentis salutparoladojn, ankaŭ mi en la nomo de GDREA. Kun granda kontento mi povis konstati, ke la materialoj de GDREA estas bone konataj ĉe KEA. La kongresa dokumentujo ekzemple enhavis numerojn de la GDR-eldono de „Paco" kaj de „der esperantist".

Posttagmeze kunsidis komisionoj pri instruado, informado, kulturo kaj aplikado de Esperanto en scienco kaj tek-

niko. Partopreninte la komisionon pri informado, bone gviditan de Maritza Gutiérrez González, kiu cetere ankaŭ redaktas la novan informilon de KEA „Karibo Stelo", mi havis bonan impreson pri la sobra kaj afereca informa agado.
Valoras mencii, ke ankaŭ eklaboris Scienc-teknika Sekcio de KEA sub gvido de Roberto Jorres Alvares. La sekcio eldonas sian propran bultenon. Sabate la kongreso aŭskultis prelegojn de prof. Haszpra (Nova baraĵsistemo sur la rivero Danubo), Marin Bacev (Instruado de Esperanto en Bulgario) kaj de mi mem (Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-monvado). Aparte impresa estis la sekva kultura programo, kiu montris konsiderindan nivelon. Ekz. la juna kemiisto Orlando Raola esperantigis la testamentan leteron de Che Guevara kaj tre arte prezentis ĝin. La vespero estis gaja kaj kube bunta. Dimanĉe oni prezentis la raportojn de la komisionoj. La nove elektita estraro reelektis kiel sian prezidanton Jesús Castillo. Pagita eficisto fariĝis Juan Lazaro Besada. Kiel sekretarioj plue laboras i. a. Alberto Fernandez Calienes (internaciaj rilatoj), Francisco Jesús Briel de Cañas (organizado) kaj Andres Piñera Prieto (kvalifikado). Bedaŭrinde mi ne sukcesis noti ĉiujn gravajn funkciulojn.
La kulturprogramo, kiu sekvis denove estis impresa. Elstaris la profesia operkantistino María Esther Pérez.
La akceptita kongresa rezulucio bone redonas la etoson kaj dinamismon de la juna movado. Pro tio ni publikigas ĝin en ĉi tiu kajero.

Fabeloj homoj

Mi ne forgesu ĉi tie aparte mencii „kuban fenomenon". Temas pri juna virino el Leipzig, kiu tie enamiĝis al kuba studento, edziniĝis, iris al Havano kaj nun tie laboras en la fremdlingva eldonejo. Petra Blanco eklernis Esperanton dum aprilo 1987, gajnis konkurson kaj flue parolas. Mi apenaŭ havis la eblecon interŝanĝi 3 — 4 frazojn kun ŝi en nia gepatra lingvo ... Ŝi tre afable helpis al la eksterlandaj gastoj kaj estis perfekta ĉiĉeronino. Tre multe pri ni ankaŭ zorgis la direktoro por publikaj rilatoj de la fremdlingva eldonejo, José A. Fernández Aragón, kiu, cetere, fine de 1986 vizitis la oficejon de GDREA. Li reguligis multajn teknikajn aferojn, helpis ĉie — kaj eĉ jam paroletas Esperanton. Li, poligloto, ne havas problemon kompreni preskaŭ ĉion. Vulkano da energio estas la direktoro de la fremdlingva eldonejo, Felix Sautié Mederos. Li kapablas argumenti por Esperanto pli bone (kaj pli profunde) ol multaj esperantistoj. Li treege subtenas KEA, estas kvazaŭ la bona patrono de la asocio. Aŭ Francisco Briel, la sekretario de KEA surprizis min per ampleksa hispanlingva manuskripto: 90 % mia libro „Internationale Plansprachen", de li tradukita. Dum la 60-aj jaroj Francisco studis en Ilmenau kaj bone konas la germanan lingvon, kiel cetere ankaŭ la edzino, juristino. Mi ankaŭ ofte pensas pri la brunhaŭta sprita Andres Piñera kaj lia prifonetika leciono, kiun li donis humore al instruistoj en Santa Clara. Ni komune veturis al tiu 300-kilometrojn fora urbo, kie mi prelegis pri interlingvistiko en la tiea universitato antaŭ 30 studentoj kaj lingvistoj. Mi estis ankaŭ tre kontenta pri la renkontiĝoj kaj interparoloj kun la trankvila kaj kompetenta prezidanto de KEA, Jesús Castillo (kiun ni prefere nomis ‚kastelo'). Lin interparolo kun Fidel Castro pri la supereco de kubaj terpomoj (kontraŭ la eŭropaj) eniris en mian trezoron de belaj anekdotoj.
En Santa Clara, kie cetere estis la lasta batalo kontraŭ Batista, tre aktivas Ana Dora Rodriguez kun sia edzo Nèstor Pérez, kiuj ambaŭ tre afable gvidis min tra la urbo kaj al la folklore tre interesa urbeto Remedios.
Aŭ mi menciu la apotekistinon Nery Ramos kaj ŝian edzon Pedro del Rio, kiuj kune kun aliaj klubanoj klarigis al mi la Parrandas Remedianas (iuspeca specifa karnevalaĵo). Do — entute — mi estis aparte impresita pro la homoj. Ne ekzistas iu ajn rasismo. Nigrahaŭtaj, brunahaŭtaj kaj alikoloruloj harmonie kunvivas. Ĉie oni sentas — malgraŭ venkendaj malfacilaĵoj — grandan optimismon, krean dinamismon.

[daŭriĝo p. 38]

Deklaro de la 1-a Kongreso de Kuba Esperanto-Asocio

Ni delegitoj al la Unua Kongreso de Kuba Esperanto-Asocio kunvenantaj en la teatro „Mella" en Ciudad Habana la 4an, 5an kaj 6an de decembro 1987, en firma rilato kun nia popolo kiel konstanta parto el ĝi, kaj:

Atentante la nunan staton de la internaciaj rilatoj kaj la maltrankvilon pro detruminaco — kiu pendas sur la terglobo kiel damokla glavo — far frenezaj militamantoj,

Rimarkante la neceson de pli bona ekonomika ordo cele al egaliĝo de interŝanĝoj inter landoj de la tiel nomata tria mondo kaj la industriaj landoj,

Komprenante ke pere de la lingva diverseco nenio pli malfaciligas ol la komunikado,

Sentante kiel en propra karno kaj en la propra koro la problemon de la lingva imperiismo kaj tiun pri ĉiu-speca diskriminado,

Analizante la proceson pri korektigado de eraroj entreprenata de nia partio kaj ĝenerale de nia tuta popolo,

DEKLARAS

I.- Ke ni tutkore apogas la sovetiajn proponojn pri malarmado cele al laúgrada foririgo de nukleaj armiloj, kies fino certe estos la celo de ĉiu esperantisto nome . . . la Monda Paco,

II.- Ke ni senkondiĉe aliĝas al la lukto por starigi la novan ekonomikan ordon, sekve ankaú por nuligi la eksteran ŝuldon pro nepagebleco,

III.- Ke ni grupigos fortojn ĉirkaú la sciencaj kaj politikaj movadoj por havigi al la homaro ĝustan kaj justan komunikivan kaj informivan sistemon luktante kontraú la informajn monopolojn,

IV.- Ke ni rifuzas kaj kondamnas la diskriminon kiel ajn ĝi prezentiĝu, kaj proklamas nian disponon lukti kontraú ĝi, kie ajn ĝi ekburĝonu,

V.- Ke ni luktos kune kun niaj ĉefkomandanto kaj partio foririgi ĉiajn erarojn elnaskitajn de imperieskaj kaj kapitalidaj inklinoj ĝis la atingo de la definitiva celo.

Kiel epilogo de tiu ĉi deklaro, ni konfirmas al nia popolo, ke ni, kubaj esperantistoj, — kaj fakte pro tio ke ni estas esperantistoj — apogantoj de la proleta internaciismo pretas helpi la revolucion kie ajn estu necesa ekde nia lingva tranĉeo aŭ en kiu ajn alia.

Por la noblaj celoj de la homaro per Esperanto.

Unua Kongreso de Kuba Esperanto-Asocio

Jen la Esperanto-jubilea poŝtmarko, kiun eldonis la kuba poŝto 1987.

[resto de p. 37]

Perspektivo

KEA havas grandajn planojn, kaj ilin realigas bonapaŝe. 1987 — la unua nacia kongreso. 1988 — Iberoamerika Espeanto-Kongreso en Havano. Kaj por 1990 KEA invitis la Universalan Kongreson de Esperanto al Havano. La oficialan invitleteron UEA jam ricevis. Ŝajne la ŝancoj estas tre bonaj. La asocio gajnas reputacion per serioza laboro, celkonscie lernas de atingoj de aliaj asocioj, kaj klopodas bone ligi la praktikon kun la teoria laboro. Kaj tio donas bonan bazon por la estonteco.

Ankaŭ GDREA pretas kaj povas subteni la evoluon de KEA, ligante pli intensivajn rilatojn al la latinamerika frata organizaĵo. En la trijara protokolo realige al la kontrakto pri kultura kunlaboro inter Kubo kaj GDRE ankaŭ la du Esperanto-asocioj estas menciitaj.

D. Blanke

D-rino Soja Zamenhof en GDR

Okaze de la jubilea jaro, diversaj anoj de la familio Zamenhof, posteuloj de la inciatinto de Esperanto, partoprenis la 72-an Universalan Kongreson de Esperanto 1987 en Varsovio. Al ili bedaŭrinde ne apartenis familianino el Moskvo. Pro tio GDR tre ĝojis, ke la nepino de la kuzo de Ludoviko Zamenhof, d-rino Soja Zamenhof el Moskvo, vizitis nian landon, GDR, kaj havis almenaŭ postjubilean renkontiĝon kun la verko de ŝia fama praulo. Laŭ invito de GDREA ŝi partoprenis la Internacian Foiran Esperantistan Renkontiĝon (IFER '88) en Leipzig kaj konatiĝis kun esperantistoj en Berlin kaj Potsdam. **La red.**

Kelkfoje ŝi jam vizitis Berlin, sed nur nun la esperantistoj ĉi tie atentiĝis pri la sovetia sciencistino kun tiu ĉi konata kaj ŝatata nomo. Mi kontaktiĝis kun doktorino Soja Zamenhof (aŭ ruse Samengof) la 7-an de marto 1988 kaj sciigis dum promenado en la urbo kaj interparolado ĉe kafotablo pri ŝia vivvojo.

Naskita la 2-an de junio 1924 en Moskvo kiel nepino de kuzo de la fondinto de Esperanto ŝi ankoraŭ rememoras pri la avo Fabian, kiu en Tula havis apotekon. La dokumenton pri la honora civitaneco de la avo en Tula ŝi posedis, sed intertempe ĝi perdiĝis. Kiel infano en la familio Soja aŭdis pri du famaj parencoj. La patro Miĥail Zamenhof (1890 — 1940) rakontis al ŝi pri la mondfama Lazar Ludvik Zamenhof, kun kiu li iam korespondis. Tiel ŝi ankaŭ aŭdis pri Esperanto. La patrino Jelisaveta Maĥailowa (1889 — 1977) emocie rakontis pri sia onklo, la fama revoluciulo kaj sekretario de la Moskva Komitato de KPR (B), V. M. Sagorski. Soja vizitis la lernejon de 1931 ĝis 1942. Dum la Dua Mondmilito post mallongedaŭra laboro kiel pionirgvidistino en lernejo kaj estrino en pionirkabineto de pionira domo en oktobro 1943 ŝi komencis studon en la jura fakultato de la Moskva universitato. En tiu ĉi universitato 64 jarojn antaŭe ŝia fama parenco komencis medicinan studon, kiun li daŭrigis en la universitato de Varsovio. La nepino de lia kuzo en 1948 finis la universitatan studon kiel diplomita juristino. Post 11-jara laboro ĉe ekonomia juĝejo ŝi estis akceptata kiel aspirantino en la instituto pri ŝtato kaj juro de la Akademio de Sciencoj de USSR. En 1963 ŝi estiĝis kandidatino kaj en 1984 doktorino de la juraj sciencoj. 125 publikaĵoj estas elokventa rezulto de ŝia scienca laboro sur la tereno de la ekonomia juro. Ĉu restas tempo por Esperanto?

Ŝi flue parolas la germanan lingvon, kiun ŝi lernis en 1975 prepare al la unua vizito en Berlin pro profesiaj kauzoj. Kunlabore kun GDR-juristoj ŝi publikigas ekonomi-jurajn verkojn. De tempo al tempo ŝi klarigas, ke en 1958 ŝi kontaktiĝis kun sovetaj esperanistoj kaj partoprenis kurson de Esperanto. Unu kaj duonan jaron ŝi membriĝis en Esperanto-klubo en la domo de la medicino de Moskvo. Rerimarkita de Boris Kolker ŝi nun estas membro de la Moskva klubo „Scio" en la fabriko „Kauĉuk". Ŝiaj eldiroj malkaŝas ĝojon pri la sukcesoj de paco kaj interkompreniĝo de la popoloj. Kun granda intereso ŝi akceptis miajn informojn pri la nuntempaj klopodoj science esplori la vivon kaj verkon de Zamenhof kaj prezenti modernan bildon pri lia personeco. Konscie pri sia signifoplena nomo la tre okupita juristino, kiu ankoraŭ ĉijare finskribos 2 pluajn librojn, intencas plue subteni la agadon de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj.

Fritz-J. Wollenberg

Deutschsprachiges Sonderheft

Die deutsche Sondernummer 1987 von „der esperantist" wird nicht an Abonnenten ausgeliefert und ist nur über den Esperanto-Verband erhältlich. Das Heft enthält Artikel über die Sprachstruktur, die praktische Anwendung, zur linguistischen Charakterisierung, Verwendung in Wissenschaft und Technik sowie für EDV, Interlinguistik/Esperantologie, zum pädagogischen Wert der Sprache, Geschichte der Arbeiter-Esperanto-Bewegung, Esperanto und Tourismus, Leben von Zamenhof, UNESCO-Resolution, Tätigkeit des Esperanto-Verbandes im Kulturbund, Leitsätze des Verbandes, weiterführende Literatur, Anschriften der Bezirksvorstände, Hinweise für die ersten praktischen Schritte u. a. Also ein wertvolles Informationsmaterial.

„La homo kaj scienc-teknika revolucio"

Jen la kadra temo de la tradicia esperantista aranĝo, aranĝo, kiun la esperantistoj de Leipzig ĉiujare proponas el GDREA kaj la eksterlanda esperantistaro. La alkvalita kongreseto ankaŭ ĉifoje logis pli ol 260 homojn el 15 landoj, inter ili estis la parencino de L. L. Zamenhof, d-rino Soja Zamenhof el Moskvo kaj Festus Kornelius el Namibio (kiu studis en GDR).

IFER '88 okazis de la 11-a ĝis 13-a de marto 1988. Vendrede vespere la partoprenantoj povis konatiĝi kun la pola kanzonisto Jerzy Handzlik, kiu — cetere sen iu kvalita voĉo — prezentis originalajn kanzonojn, parte sprite ligitajn al la esperantista vivo. La sabaton antaŭtagmeze denove prelegis la membro de la prezidio de la UNESKO-Komisiono de GDR, d-ro Helmut Tautz. Sed ĉi-foje li aperis en sia kroma funkcio kiel sekretario de la „Nacia Komitato de GDR por la Monda Dekado de Kultura Evoluo". D-ro Tautz prezentis ideojn pri la ligoj inter kultura evoluo kaj la kadra temo de IFER kaj atentigis pri la eblecoj de la esperantistoj, kontribui al la Monda Dekado.

Prof. d-ro Otto Haszpra, estrarano de UEA, prelegis pri la scienc-teknika revolucio kaj la Esperanto-movado. Lian prelegon sekvis vigla diskuto kun la prezidianoj. (Krom la menciitaj prelegintoj ankaŭ Wera Blanke, Michael Behr, d-ro Vlastimil Novobilski, d-ro Erich-Dieter Krause.)

Plia ege interesa prelego antaŭ la pleno estis de d-ro Klaus Bochmann pri la „homo kaj scienc-teknika reovlucio el la vidpunkto de la medicinisto", kiu aparte tuŝis la rilatojn inter kuracisto-paciento kaj ankaŭ traktis la ofte tabuigitan temon de la mortado. Andrzej Pettyn, direktoro de la Esperanto-redaktcio de Radio Polonia, prezentis partojn de la inaŭguro de la Jubilea Kongreso. En la kadro de kelkaj paralele kunvenintaj fakgrupoi estis prezentitaj jenaj prelegoj:

Instruistoj: „Vojoj de la instruado de Esperanto" (Edward Symoens, Belgio, vicprezidanto de ILEI), „Matematika pensmaniero kiel helpilo en lingvoinstruado" (d-rino Ilona Balogh, Hungario).

Komputistoj: „Terminoj pri komputado en la Suplemento de PIV" (Michael Behr, GDR), „Perkomputila iteracia kalkulado de necesa murkideco por vitraj tuboj" (Andre Weber, GDR).

Krome kunvenis la scienc-teknika komisiono de UEA sub la gvido de prof. Haszpra, Terminologia Esperanto-Centro de UEA (Wera Blanke), Forstista Fakgrupo (d-ro Karl-Hermann Simon), Ekologoj (Ronald Schindler), Poŝtistoj (Horst Isensee).

La posttagmezon fermis la muzikisto Rolf Deke (GDR) per elstara demonstrado de komputile farita muziko. La vespero estis danca. Krome okazis malgranda akcepto flanke de la 1-a sekretario de la Distrikta Estraro de Kulturligo Leipzig, d-ro Rudolf Fiedler. Samvespere (sed nur 20,30) la Aktuala Kameroo de la GDR-televido prezentis filmraporteton pri la antaŭtagmeza malfermo.

La dimanĉo denove estis tre prelego-riĉa. Post lumbilda prelego de ge-roj Brandenburg pri „Bona Espero" (esperantista komunutila bieno en Brazilo, kie oni i. a. alfabetigas orfajn brazilajn infanojn) sekvis bonega prelego de Edward Symoens el Belgio pri „Esperanto en Afriko". La preleginto mem vivis 25 jarojn en Afriko kaj tre klare prezentis la multajn politikajn, ekonomiajn kaj socialajn problemojn ligitajn al la temo. Krome Josef Vondroušek el ĈSSR prelegis pri la ĉeha literaturo en Esperanto. En la nomo de la IFER-anoj '88 d-ro Detlev Blanke dankis al al organizintoj kaj aprezis la tutan aranĝon. Entute vere multflanka evento, kiu proponis al ĉiu ion interesan. Valoras mencii, ke ekzistis aparta solidarecstando favore al UNICEF. La esperantistoj de Leipzig denove organizis elstaran renkontiĝon, donis multe da forto, energio kaj ideoj. Ni danku ilin pro tio.

D. B.

Komuniko

Inter la 24-a ĝis 29-a de aprilo 1988 en Ĉeske Budejovice/ĈSSR okazis la 21-a Konsultiĝo de Esperanto-asocioj de socialismaj landoj.

Partoprenis delegitoj de la landaj asocioj el Bulgario, ĈSSR, (ĉeha kaj slovaka asocioj), GDR, Hungario, Kubo, Pollando (PEA kaj Pola Studenta Esperanto-Komitato en la Asocio de Polaj Studentoj), Soveta Unio kaj Vjetnamio.

La Partoprenantoj substrekis la gravecon de la komenciĝanta procezo de malarmado kaj malstreĉiĝo, kiu kreas favorajn kondiĉojn por la plua evoluo de la Esperanto-movado en la mondo.

La Konsultiĝo alte taksis la rezultojn de la Esperanto-movado lige al la 100-jariĝo de la Internacia Lingvo kaj emfazis aparte la grandan kontribuon de Pola Esperanto-Asocio, kiun ĝi donis per la organizado de la jubiela kongreso.

La Konsultiĝo i. a. traktis kaj interkonsentis pri problemoj de pli efika praktika kunlaborado inter la partoprenantoj asocioj, diskutis pri eldonplanoj, la starigota Zamenhof-centro en Bjalistoko, la Internacia Kultura kaj Kleriga Centro en Poprad kaj pri la aktivigado de la junulara agado.

La portoprenantoj dankas al Ĉeha Esperanto-Asocio kaj al la Esperanto-klubo „La Progreso" pro la bonaj laborkondiĉoj.

Ĉeske Budejovice, 28. 4. 1988

Interlingvistika konferenco en Tartu (Soveta Unio)

La 22-24-an de Oktobro 1987 en la Ŝtata Universitato de Tartu (Estona SSR) okazis scienca konferenco „Planlingvoj: rezultoj kaj perspektivoj". Ĝi estas la dua interlingvistika aranĝo, okazinta en Soveta Unio en la jubilea jaro. (Maje 1987 Moskva Instituto de Lingvosciencoj organizis sciencan simpozion „Interlingvistikaj aspektoj de terminologio".) La konferencon inaŭguris akademiano Paul Ariste kaj la ĉeforganizanto profesoro Aleksandr Duličenko.
En la konferenco estis prezentitaj 30 prelegoj. La unua tago estis dediĉita al ĝeneralaj problemoj de la kreado de planlingvo, historio kaj nuntempaj aspektoj de interlingvistiko. Pri tiuj problemoj kontribuis prof. A. Duličenko (Tartu), prof-ino O. Aleksandrova (Moskvo), d-ro S. Kuznecov (Moskvo), d-ro Detlev Blanke (GDR — foreste), S. Tkačev, O. Leŝčak (Ternopol), A. Melnikov (Rostov-Don), V. Gubarov (Moskvo) kaj aliaj.
La 23-an de oktobro estis prezentitaj esperantologiaj kontribuoj. La plej interesaj estis: „Karakterizoj morfologiaj kaj vortoderivaj de rusaj esperantofonoj" de A. Korjenkov (Sverdlovsk), prelego de A. Vaitilavičius (Vilnius) „Senlogikaj imitaĵoj en Esperanto el naciaj lingvoj", prelego de V. Kornilov (Doneck) „Esperantaj participoj kiel problemo de ĝenerala kaj komparativa participologio", prelegoj de N. Zaiĉenko (Simferopol) kaj L. Mjasnikov (Velikije Luki) pri esperantaj frazeologismoj. La atenton de partoprenantoj kaptis ankaŭ la prelego de J. Ojalo pri estona literaturo en Esperanto kaj aliaj kontribuajoj.
En la tria tago de la konferenco temis pri la monda lingva situacio, problemoj de interlingva komunikado. Per la prelegoj kontribuis d-ro S. Kusnecov (Moskvo), d-ro G. Cihun (Minsk), D. Ciskaraŝvili (Tartu), prof. A. Duličenko (Tartu) k. a.
La konferencon kronis diskuto ĉe la ronda tablo. Plej interesis ĉiujn la demandoj pri statuso de interlingvistiko kaj ĝia loko inter lingvistikaj disciplinoj, aspektoj de socia direktado de lingvo, ekzistoformoj de internacia lingvo, perspektivoj kaj aspektoj de evoluo de planlingvo (Esperanto).
Novembre estos presita tezaro de la konferenco kaj en 1989 aperos speciala eldono de „Interlinguistica Tartuensis" kun la tekstoj de la prelegoj.
Oni planas organizi interlingvistikajn konferencojn en Tartu regule unu foje dum trikvar jaroj.

[Ricevita el Tartu]

Simpozio Interlingvistika „Cent Jarojn Esperatologio", IEK Pisanica, 1987/10/4-10

En tiu simpozio partoprenis 30 esperantistoj el 7 landoj (Bulgario, Francio, GDR, Hungario, Pollando, Sovetunio, Svislando), inter ili elstaraj sciencistoj kaj akademianoj, sed ankaŭ reprezentantoj de lokaj E-societoj.
Oni povus dividi la temaron en tri komplekssojn:

— interlingvistiko
— esperantologio
— disvastigo de Esperanto (movado, literaturo, dokumentado, instruado).

Pri interlingvistiko parolis ĉefe S. Kuznecov/SU. Liaj ĉi-koncernaj temoj estis: La esplorkampo de interlingvistiko; la evoluo de planlingvo; la historio de diversaj planlingvoj; komparo inter Esperanto kaj Interlingua. K. Baceva/BG kontribuis per komparo inter Esperanto kaj Occidental.

H. Sörgel/GDR superrigarde parolis pri interlingvistiko, Esperanto kaj komputillingvistiko, kio transpontis la du ĉefajn temkompleksojn. La plej multaj el la aliaj prelegintoj traktis diversajn esperantologiajn temojn, ekz. jenajn: „Fundamento de Esperanto" — solida bazo por evoluo de la lingvo: (a) Apero kaj destino de la Fundamento, (b) La Zamenhofa gramatiko — ĉu el nur 16 reguloj? (V. Oljanov/BG); La problemo de la normo (M. Duc Goninaz/F, R, Rokicki/PL); Kio estas „vorto" en Esperanto (Duc Goninaz); Pri klasigo de Esperanta morfemaro konforme al la funkcio en la leksema strukturo (Rokicki); Interfero inter la angla, la germana kaj Esperanto kiel fonto de eraroj (G. Häusler/GDR).

Aldone S. Kuznecov raportis pri la Kongreso de Lingvistoj en Berlino, la tria, en kiu Esperanto ludis rolon.

Pri la internacia Esperanto-movado kaj la Esperanto literaturo prelegis V. Benczik/H. A. Künzli/Svislando konatigis la Centron de Dokumentado kaj Esplorado pri IL Chaux-de-Fonds (CDELI).

Pedagogian temon, nome la rolon de la lerna psikologio, traktis Achim Zettier/GDR.
Tre impresis min la bonega organizado de la tuta aranĝo. Ekzistis nek hasto nek ekscitiĝo, sed ĉio kvazaŭ nerimarkite evoluis.
La malgranda nombro da partoprenintoj ebligis bonan interkonatiĝon. Ne gravis la titoloj de la ĉeestintoj, sed ĉiuj estis kolegoj kaj baldaŭ eĉ amikoj, kiuj alparolis unu la alian per antaŭnomoj.
Preskaŭ ĉiun posttagmezon ni ekskursis per nia propra Esperanto-buso. Tiel in vizitis la urbon Smoljan, la belegan vilaĝon Ŝiroka Laka, la restadejon Pamporovo, la groton Uĥlovica kaj — ununuran fojon piede — la najbaran Ĥasovica.
Vespere okazis diskotekoj aŭ liberaj diskutoj kaj konversacioj — laŭvole kaj laŭplaĉe. Disvastiĝis kaj pluevoluis la Esperanta kulturo (legado de propraj rakontoj kaj poemoj far M. Bacev/BG kaj N. Andrianova/SU, kantado de konataj kaj novkreitaj kantoj).
Resume: La ‚alta protektanto' de la simpozio, profesoro Violin Oljanov, pravis, kiam li komcene diris, ke estos „scienc-amuza aranĝo".

Gerda Häusler, Magdeburg

Ivo Lapenna (1909 — 1987)

La 15-an de decembro 1987 forpasis en Kopenhago prof. d-ro jur. Ivo Lapenna, kiun la organo de UEA prave nomis „la plej granda movada organizanto en la historio de la Internacia Lingvo". Ivo Lapnena naskiĝis la 15-an de novembro 1909 en Split, Jugoslavio. Li studis muzikon kaj internacian juron. Dum la milito li eniris la partizanan armeon de Tito (atingis la rangon de majoro) kaj post la milito fariĝis profesoro pri internacia juro en la Universitato de Zagreb. Jam dum la 30-aj jaroj li agadis en la jugoslavia kaj internacia Esperanto-movadoj. 1949 Lapenna forlasis Jugoslavion kaj ekde 1951 loĝis en Londono kie li laboris kiel profesoro en la Londona Altlernejo pri Ekonomio ĝis lia pensiuliĝo en la jaro 1977.

La nomo de Ivo Lapenna forte enradikiĝis en la postmilita Esperanto-movado. 1954 en Montevideo okazis Ĝenerala Konferenco de UNESCO, kie la monda organizaĵo akceptis la unuan rezolucion favore al Esperanto. Tio estis grandparte la merito de Ivo Lapenna. Ekde 1955 ĝis 1964 li estis ĝenerala sekretario de UEA kaj de 1964 — 1974 perzidanto de UEA. Lapenna decide influis multajn kampojn de la tutmonda esperantista agado, i. a. per jenaj aktivecoj:

— modernigo de UEA

— seriozigo de la informado pri Esperanto

— ellaboro kaj praktika prezento de modela stilo de parolo en Esperanto (retoriko)

— lanĉo de scienc-dokumenta centro (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingva Problemo, CED) kaj fondo de la grava socilingvistika revuo „La Monda Lingva Problemo (1969 — 1977).

— Fakte li, verŝajne nekonscie, subtenis la evoluon de socipolitika interlingvistiko, kiu metas en la centron de sia esploro ne nur la planlingvojn sed la mondan lingvoproblemon mem.

La meritoj de Ivo Lapenna estas sendubaj. Neniu serioza esperantisto povas aŭ volas ilin nei. Sed bedaŭrinde fine de la sesdekaj kaj komence de la 70-aj jaroj kreskis kontraŭdiroj inter li kaj ne malgrandaj partoj de la gvidantaro de la internacia Esperanto-movado. Nekompreno pri la ŝanĝiĝanta internacia monda situacio, pri la bezonoj de UEA al pli vasta universaleco, troa sentemo rilate al objektiva kritiko, certa pensmaniero influita de la „malvarma milito" kondukis lin en direkton, kiu finfine bremsis la pluan evoluon de la asocio. 1974, dum la 59-a Universala Kongreso en Hamburo, vidante ke li ne plu havos ŝancon esti reelektita kiel prezidanto de UEA, li eĉ malmembriĝis. Li poste agadis en la tiel nomata „Neŭtrala Esperanto Movado", kiu havis sufiĉe dekstrajn poziciojn kaj tute ne estis „neŭtrala". Tiuj liaj miskomprenoj kaj misjuĝoj dum la lasta periodo de lia esperantista agado apartenas al lia persona tragiko. Sed ili neniel povas dubindigi lian eksterordinare grandan kaj altkvalitan kontribuon, kiun li donis al la postimilita evoluo de Esperanto kaj de ĝia parolantaro.

Malgranda elekto el la plej gravaj fakaj verkoj de Ivo Lapenna:

— La signifo de la UNESKO-Rezolucio. En: Esperanto, **46**, (1954), N-ro 1 (566), p. 3—6
— (Redaktado) La internacia lingvo. Faktoj pri Esperanto. London: UEA, 1954
— Retoriko. Kun aparta konsidero al esperantlingva parolarto. 2-a eldono. Rotterdam 1958
— (Redaktado) Memorlibro pri la Zamenfjaro. London 1960
— Jes, Esperanto is the answer to the world language problem. En: International Language Review. Denver, **9** (1962 — 1963), n-ro 29—30
— Elektitaj paroladoj kaj prelegoj. Rotterdam 1966
— La situation juridique des „langues officielles" avant la fondation des Nations Unies. En: La Monda Lingvo- Problemo, Den Haag, **1** (1969) n-ro 1, p. 5—18
— La situation juridique des langues sous la régime des Nations Unies. En: La Monda Lingvo-Problemo, Den Haag, **1** (1969), n-ro 2, p. 87—106
— The common language question before international organisations. En: La Monda Linvo-Problemo, Den Haag, **2** (1970), n-ro 5, p. 83—102; **3** (1971), n-ro 7, p. 11—30
— La ideo de interŝtata konvencio pri enkonduko de Esperanto en lernejojn. Klopodoj en la pasinteco — eblecoj en la nuntempo. En: Internacia Pedagogia Revuo, Piza, **6** (1976), p. 16—24
— La internacia Lingva kiel jurscienca komunikilo. En: Internacia Jura Revuo, Oslo, n-ro 18 (8/1978), p. 2—17
— Internacieco de Esperanto. En: El Popola Ĉinio, Beijing, n-ro 6/1987, p. 16—19
— Juraj terminologiaj problemoj kun aparta konsidero al la esperantlingva jura terminologio. En: Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo. II. Esperantismo, La Laguna: Universidad de la Laguna, 1987, p. 333—352
— (Redaktado) I. Lapenna/U. Lins/T. Carlevaro: Esperanto en perspektivo. Faktoj kaj analizoj pri la Internacia Lingvo. London-Rotterdam, 1974

(„Redaktado" ne nur signifas, ke I. Lapenna redaktis aŭ kunredaktis la koncernan volumon, li ankaŭ verkis multajn ĉapitrojn mem)

D. Blanke

Yukika Isobe (1913 — 1988)

La konata japana esperantistino, direktorino de la Japana Esperanto-Instituto, Yukika Isobe, forpasis la 15-an de januaro 1988 en Tokio. Ŝi havis multajn amikajn rilatojn al esperantistoj de GDR kaj vizitis nian landon post la jubilea kongreso, por konatiĝi kun la fama „tombo de la germana-japana amikeco" en Marbach (kp „der esperantist" 146 [6/87], p. 139). GDREA sincere kondolencas al JEI kaj la familianoj.

Paul Neergarrd (1907 — 1987)

La 13an de novembro 1987, en aĝo de 80 jaroj, mortis la konata dana sciencisto (sempatologo) kaj esperantologo prof. d-ro Paul Neergaard.

Libroekspozicioj en Moskvo

Jubileaj libroekspozicioj en Moskvo estis organizitaj diversloke omaĝe al la centjariĝo de Esperanto. De la 18a de majo ĝis la 17a de junio 1987 dum la tuta monato funkciis la unua sub la devizo „Esperanto en la servo de la paco kaj progreso" en la Tutsovetia Ŝtata Biblioteko kune kun la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE). Estis prezentitaj preskaŭ 600 libroj eldonitaj en diversaj landoj de la mondo. Estis reprezentitaj ankaŭ la aliaj planlingvoj volapuko, ido, interlingua. La vizitantoj povis spekti la librojn de Ludoviko Lazaro Zamenhof, respektive tiujn pri Zamenhof, diversajn lernolibrojn, antologiojn en Esperanto, Enciklopedion de Esperanto, folklortemajn eldonaĵojn, periodaĵojn, beletrajn verkojn, porinfanajn librojn, sociopolitikan literaturon, brajlajn librojn por blinduloj k.t.p.

Krom ĉio ĉi estis prezentita filatela ekspozicio de raraj poŝtmarkoj, kovertoj kaj diversaj ilustritaj materialoj: afiŝoj, totoj, artikoloj k.t.p.

La solenan malfermon partoprenis la prezidanto de ASE, k-do Mahomet Isajev, sovetiaj reprezentantoj de UNESKO kaj MEM, honoraj gastoj kaj pli ol 60 personoj, plejparte esperantistoj. Ĉeestis la aranĝajon ankaŭ fotoraportistoj kaj jurnalistoj. La ekspozicio estis prezentita ankaŭ en la televido.

La duan ekspozicion organizis ASE kune kun la Sovetia Komisiono de UNESKO kaj Ĝenerala Direkcio de Internaciaj Librofoiroj kaj -Ekspozicioj en la nova ekspozicia centro „Libro" sur la teritorio Ekspocenter. Tie prezentiĝis scienc-teknika literaturo, beletristiko k. a. Tiu ekspozicio funkciis de la 23a de ĝis 27a de junio 1987. Estis organizita ekskurso por ĉiuj. Speciale por blindaj esperantistoj el diversaj urboj de Sovetio, kiuj kunvenis en Moskvo la 29an de junio. Samcentre okazos ankaŭ en la estonto kunvenoj de esperantistoj. La ekspoziciojn vizitis ne nur moskvanoj, sed ankaŭ eksterlandanoj.

V. Jefremova

Infana ekspozicio

„Mi havas en la poŝo tute malgrandan ŝlosileton. Ĝi estas pli malpeza ol betula folieto, kiun vento forblovos, pli malpeza ol plumeto en beko de birdeto, pli malpeza ol fumo el pajlero, kiu ekflamis en fajro. Kaj tamen la ŝlosileto estas mia tuta trezoro . . . Ĝi malfermas al mi pordegon en plej belegan landon, en la landon de fabeloj, en la landon de sonĝoj kaj de varma koro."

Maurice Carême

La popola lernejo de artoj en Žaclér en kunlaboro kun la E-klubo en Trutnov kaj ČEJ aranĝas internacian ekspozicion de infanaj artverkoj „Ŝlosilo en la regnon de fabeloj".

Ni petas ĉiujn infanojn, kiuj ŝatas pentri, modli . . . pri partopreno.

Tekniko: libervola

Aĝo de partoprenantoj: ĝis 18 jaroj

Bonvolu indiki: lando, nomo, knabo/knabino, aĝo kaj loĝloko de aŭtoro.

Ĉiuj partoprenantoj ricevos memoraĵon.

Sendu la artverketojn ĝis 30. 9. 1988 je adreso: LSU, 54201 Žaclér, Ĉeĥoslovakio

Blindaj esperantistoj

Tut-Sovetia Renkontiĝo de Blindaj Esperantistoj okazis en Moskvo inter la 28a de junio kaj la 7a de julio 1987, kiun partoprenis 173 homoj el 47 urboj de 11 respublikoj. La plej juna partopreninto estis 9-jara, la plej maljuna 74-jara. La kunvenintoj aŭskultis prelegon „Interlingvistiko ĉe sojlo de centjariĝo de Esperanto", kiun prezentis S. Kuznecov, doktoro de filologiaj sciencoj. L. Medvedev, kandidato de biologiaj sciencoj, rakontis pri la naturdefenda agado de la Esperantomovado. Biografiojn de nevidantaj esperantistoj prezeptis al ni A. Masenko, prezidanto de la Espernto-Sekcio ĉe Stacropola blindulorganizo kaj T. Andreeva, prezidantino de la Leningrada klubo. La kulturan programon konsistigis multaj diversaj altnivelaj eroj, kiel Vespero de Uniaj Respublikoj kaj granda jubilea Vespero al la Centjariĝo de la Internacia Lingvo. Estis aranĝita ekskurso al la Ekspozicio de politika, beletra, porinfana, sciencteknika, informa literaturo en Esperanto ĉe la Ekspo-Centro.

Valerij Morejno

Du fakaj seminarioj en Bulgario

La distrikta estraro Vraca de la Bulgara Esperantista Asocio kaj la Astronaŭtika Societo, Filio Vraca, invitis al partopreno de du internaciaj altrangaj aranĝoj inter 16-a kaj 20-a de oktobro 1987. La unua evento estis internacia konferenco pri la propagando de Esperanto en la profesioj sub la titolo „Esperanto pri kosmaj esploroj. Ĉeestis fakuloj kaj interesuloj el kvar landoj, nome el Bulgario, Pollando, Svislando kaj GDR. Ambaŭ aranĝoj estis organizitaj tre bone. Dum la konferenco paroladis elstaruloj de la Bulgara Esperantista Asocio. Menciitaj nur estu Petr Todorov kaj Violin Oljanov. La sekretario de la Svisa Esperanto-Asocio prolis pri la rolo de Esperanto en la amasmedioj kaj pri faka aplikado.. Mi mem parolis pri Esperanto en la naturprotektado.

La seminario pri kosmaj esploroj okazis je la sekvinta tago. Estis prezentitaj kaj originalaj kaj perkorespondaj prelegoj. Paroladis anoj de la akademio de la sciencoj en Bulgario kaj mi pri la reagoj de la gazetaro de GDR okaze de la kosmolanĉo de S. Jähn en la jaro 1978. Estis senditaj treege interesaj kontribuaĵoj el eksterlando, ekz. tri prelegoj venis de B. Golden, kies nomon oni ofte povas legi en la internacia gazetaro.

Dum la tuta restado regis bona amikeca atmosfero. La menciitaj aranĝoj nur okazis de vendredo ĝis dimanĉo, sed por la eksterlandanoj estis aranĝita ankaŭ plenŝtopita programo dum la aliaj tagoj. Tiel ni vizitis diversajn kulturajn aranĝojn kaj estis invitita de la urbestro de Vraca.

Ĉiuj prelegoj de ambaŭ aranĝoj aperos en broŝuro kune kun aliaj, kiuj estis prezentitaj en la 100-a jubileo de Esperanto en Bulgario.

Ronald Schindler

La gazetaro pri ni 1986

Ni petas la leganton pardoni, ke la superrigardo pri la aperintaj gazetartikoloj de 1986 aperas tiom malfrue en nia revueto. Sed spacomanko kaj malfruoj en la aperritmo de „der esperantist" tion kaŭzis. Ni tamen opinias tiun superrigardon valora materialo, kiu spegulas la kreskantan interesiĝon pri Esperanto en GDR.

1. Centraj gazetoj kaj revuoj

1.1. Fakrevuoj kaj organoj de fakorganizajoj

— Börsenblatt für den deutschen Buchhandel, n-ro 35/86 informo pri E-movado kaj E-literaturo en Ĉinio;
— Sammler Express, julio 86 filatelia tutaĵo okaze de la 71a UK; 2/7fcm

1.2. Aliaj centraj gazetoj kaj revuoj

— Neues Deutschland, SED, 25./26. 1. 86 E-movado en la disktrikto Schwerin, 24. 5. 86 75 jaroj LEA, 17. 7. 86 moneroj okaze de la 100-jara jubileo, 22. 7. 86 somera E-kurso en Bulgario, 24., 28. 7., 4. 8. 86 71a UK, 20./21.9. 86 Ludwig Renn kaj „Popola Fronto", 13./14. 12. 86 E-konferenco en Sofio, 20./21. 12. 86 E-muzeo en Sarajevo; 10/71 cm
— Junge Welt, FDJ, 27. 3. 86 invito al 2a Junulara Pacrenkonto;
— Der Morgen, LDPD (ekster la serio), 3. 1. 1986 amplekse internacia seminario en Bad Saarow, 14. 3. 86 ĉina E-vespero, 26. 7., 27. 7., 29. 7. 86 71a UK, septembro 86 Junulara Pacrenkonto;
— Mitteilungsblatt, Kulturbund, 1/86 informo pri 5a IMEK, 2/86 IFER 86, E-Thälmann-prospekto, 3/86 anonco printempa renkontiĝo en Potsdam, anonco pri „Internaciaj Planlingvoj" de D-ro Blanke, 4/86 3a Park-renkonto en Halle, renkonto en Berlin okaze de la 75a datreveno de LEA, 5/86 interlingvistika seminario en Zempin, internacia pacrenkonto en Volgograd, 19a konsultiĝo de la asocioj de socialismaj landoj, E-filmo dum E-renkonto en Waltershausen;
— Sonntag, Kulturbund, n-ro 9, 11, 15/86 diskutado pri Esperanto en la libro de Gramsci „noticoj pri lingvo kaj kulturo", informo pri 71a UK, 19a Internacia Pupteatra Festivalo en Zagreb;
— Tribüne, FDGB, 15. 4. 86 E-jubileo de LEA;
— FF Dabei, 15. 12. 86 anonco pri E en radiodisaŭdigo; 25/230 cm

2. Distriktaj gazetoj

2.1. Berlin

— Berliner Zeitung, 24. 7. 86 71a UK kaj pri E en pola radiodisaŭdigo, 4. 8. 86 mallonge rezulto de la 71a UK, 29. 8. 86 Internacia Pupteatra Festivalo;
— BZ am Abend, 15. 4. 86 75a datreveno de LEA, 28. 6. 86 intervjuo kun D-ro Blanke pri E (bildo), 28. 7. 86 71a UK;
— Neue Zeit, CDU, 31. 10. 86 amplekse pri E kaj E-movado en Berlin; 80/100 cm

2.2. Cottbus

— Lausitzer Rundschau, SED, 10. 1. 86 anonco pri E-kurso, 25. 6. 86 E-renkontiĝo, 4. 8. 86 71a UK, 5. 9. 86 anonco pri E-kurso, E en la Kulturligo, 16. 9. 86 mencio pri fondo de E-grupo, 26. 9. 86 varbo por E-kurso, 10. 10. 86 same;
— okular, SED, detala informo pri E; 9/43 cm

2.3. Dresden

— Sächsische Zeitung, SED, 3. 1. 86 amplekse pri E-agado (Meissen) kaj Thälmann-prospekto en E (Zittaŭ), 18. 3. 86 E-agado en Dresden, 23. 5. 86 printempa porpaca migrado en Jablonec, 28. 7. 86 71a UK, 4. 8. 1986 varbo por E (Bischofswerda), 3. 9. 86 E en Kulturligo (Bischofswerda), 20. 10. 86 amplekse Trilanda Renkontiĝo (Zittaŭ), 23. 10. 86 varbo al nova E-kurso (Dresden), 18. 11. 86 informo pri balotoj kaj varbo al E-kurso (Prna), 21. 11. 86 renkontiĝo de LEA-aktivuloj en Netzschkau (Zittaŭ), 19. 12. 86 preparo de 100-jara jubileo, 30. 12. 86 informo pri E-agado (Zittaŭ);
— Sächsische Neueste Nachrichten, NDPD, 30. 5. 86 informo pri E en Radio Polonia, 2. 10. 86 varbo al E-kurso kaj informo pri la 100-jara jubileo;
— Bauern-Echo, DBD, 6. 11. 86 E-renkontiĝo;
— Sächsisches Tageblatt, LDPD, 7. 8. 86 E en Radio Polonia, 2. 10. 86 E-kurso;
— Dresdner Stadtrundschau, loka gazeto, 23. 10. 86 varbo al E-kurso; 21/224 cm

2.4. Erfurt

— Das Volk, SED, 5. 3. 86 LEA-renkontiĝo, 10. 4. 86 E-renkontiĝo, 24. 7. 86 71a UK, 5. 8. 86 Esperanto kaj Ido, 11. 9. 86, 18. 9. 1986, 4. 10. 86, 10. 10. 86 varbo al E-kurso;
— Thüringische Landeszeitung, LDPD, 10. 1. 1986 preparo de IFER 86, 4. 5. 86 IFER 86, 3. 7. 86 kaj 4. 7. 86 E-ekspozicio okaze de la tagoj de Kulturligo, 24. 7. 86 somera E-kurso en Bulgario, 29. 7. 86 71a UK, 12. 9. 86 baza E-kurso, 3. 10. 86 E-kurso komenciĝas, 28. 10. 86 junulara porpaca renkontiĝo, 18. 11. 86. 9a LEA-renkontiĝo;
— Thüringer Neueste Nachrichten, NDPD, 13. 6. 86 75 jaroj LEA; 17. 7. 86 80jaroj E-monero, 25. 11. 86 10 jaroj E-grupoj en Eisenach;
— Thüringer Tageblatt, CDU, 6. 9. 86, 8. 10. 86 nova E-kurso, 16. 9. 86 E-kurso por komencantoj;
— Der Gummiwerker, Waltershausen, n-ro 1 Thälmann-prospekto, n-ro 2/3 E-retrospektivo, n-ro 5 Leipzig-urbo de laborista E-movado, n-ro 10 IFER 86, n-ro 11 E en Kulturligo, n-ro 19 E-kurso planita, n-ro 20 E-kurso komenciĝis, n-ro 22 100 jaroj E kaj 71a UK;
— Der Fahrzeugbau, Waltershausen, n-ro 11 E-filmo kiel amika donaco, n-ro 16 informa vespero, n-ro 19 E-istoj kaj pacmovado, n-ro 22 E kaj porpaca agado kaj pri Zamenhoffesto; 39/minimume 200 cm

2.5. Frankfurt/Oder

— Neuer Weg, SED, 17. 4. 86 E pliriĉigas kulturan vivon (intervjuo kun bildo), 25. 10. 1986 E en Berlin; 2/53 cm

2.6. Gera

nenio alvenis en la oficejo;

2.7. Halle

— Freiheit, SED, 21. 1. 86 anonco de E-kurso en vespera lernejo, 4. 3. 86 recenzo de „Internaciaj planlingvoj" de D-ro Blanke,

8. 3. 86 E-renkontiĝo en Wörlitz (Gräfenhainichen), 3. 9. 86 anonco de E-aranĝoj, 4. 9. 86 bildkartaj E-salutoj el multaj landoj, 23. 10. 86 E-leteroj el 27 landoj, 28. 11.
— Liberaldemokratische Zeitung, LDPD, jan. 1986 E-fakvortaro de muzea scienco; 1986 pri E-kursoj en Dessau kaj informo pri E, 18. 3. 86 kulturaranĝo de E-junuloj, 19. 3. 86 IFER 86, 24. 3. 86 E en Radio Polonia, 14. 7. 86 amplekse pri E kaj naturamikoj, 29. 7. 86 kaj 4. 8. 86 71a UK, 2. 9. 86 E-agado en Quedlinburg, 17. 10. 1986 E-leteroj el 27 landoj, 22. 11. 86 E-prospekto pri E.-Thälmann-memorejo;
— Der Neue Weg, CDU, 3. 3. 86 pri kulturaranĝo de E-junuloj, varbo al E-kurso kaj anonco de informa vespero, 14. 3. 86 informo pri IFER 86, 17. 10. 86 E-leteroj el multaj landoj, 29. 10. 86 intervjuo pri E kiel rimedo de popolamikeco, 15./16. 11. 86 E-dialogoj; 26/184 cm

2.8. Karl-Marx-Stadt

— Freie Presse, SED, 9. 1. 86 anonco pri E-ekspozicio (Auerbach), 17. 1. 86 pli longa varbo por unusemajna E-kurso por gelernantoj, 28. 1. 86 Thälmann-prospekto en E (Auerbach), 29. 1. 86 varbo al E-kunvenoj kaj kurso, 27. 2. 86 E en vespera lernejo, 12. 3. 86 letero pri E-tendaro por specialistoj, 15. 3. 86 Ĉinio-vespero, 3. 4. 1986 E-istoj el Schwarzenberg partoprenas je IFER 86 (bildo), 8. 4. 86 IFER 86, 29. 5. 1986 E-ekspozicio (Werdau), 25. 6. 86 E-renkontiĝo, 30. 7. 86 E-istoj en E-tendaro Lanĉov (Schwarzenberg), 8. 8. 86 la prezidanto de CE informas pri la 71a UK (Breitenbrunn), 20. 8. 86 informo pri la sama aranĝo, 18. 9. 86 2a pacrenkontiĝo de E-junuloj, 26. 9. 86 9a Internacia Turisma Renkontiĝo, 15. 10. 86 20-jara jubileo de E-grupo en Schwarzenberg, 1. 11. 86 Jepro 86, 13. 11. 86 9a LEA-renkontiĝo (bildo) Reichenbach, 27. 11. 86 amplekse pri E-agado (Schwarzenberg) 5. 12. 86 Jepro 86;
— Blick, uzina gazeto, 12. 3. 86 letero pri pionira E-tendaro; 22/235 cm

2.9. Leipzig

— Leipziger Volkszeitung, SED, 14. 3. 86 du ampleksaj artikoloj pri la E-movado en Leipzig kaj IFER 86, 12./13. 4. 86 du trionpaĝa kontribuo pri la historio de germana-soveta amikeco inter E-istoj (bildo), 30. 6. 1986 varbo al E-kurso, 18. 7. 86 anonco de informvespero, 4. 8. 86 pli detale pri la 71a UK, 19. 9. 86 informo pri E-movado en Leipzig kaj IFER 87;
— Mitteldeutsche Neueste Nachrichten, NDPD, 17. 3. 86 amplekse pri E en Leipzig, IFER 86 kaj ĝenerale pri E;
— Der Schmiedewerker, 10. 1. 86 Thälmann-prospekto; 9/327 cm

2.10. Magdeburg

— Volksstimme, SED, 28. 2. 86 Thälmann-prospekto en E, 5. 4. 86 IFER 86, 17. 12. 86 100-jara jubileo;
— Mitteldeutsche Neueste Nachrichten, NDPD, 26. 11. 86 artikolo pri la E-isto D. Dungert;
— Der Neue Weg, CDU, 21. 3. 86 IFER 86; 5/60 cm

2.11. Neubrandenburg

— Freie Erde, SED, 7. 2. 86 pri 14a semajnfina E-seminario, 19. 2. 86 soveta E-letero el Samarkand, 1. 3. 86 detala varbo al E-kurso en vespera lernejo, 18. 3. 86 impresoj pri semajnfina E-kurso en Neubrandenburg, 4. 8. 86 71a UK (ĉiuj Neubrandenburg), 24. 9. 86 invito al prelego pri E ĝenerale kaj E-movado en Ĉinio, 30. 9. 1986 varbo al E-kurso (Neubrandenburg), 9. 10. 86 informo pri interesa E-aranĝo, 31. 10. 86 varbo al E-kurso (Prenzlau), 3. 11. 86 pri porpaca agado de E-istoj, 22. 12. 86 internacia solidareco kaj E, 31. 12. 86 pri E-agado en Prenzlau (Prenzlau);
— Der Demokrat, CDU, 2. 8. 86 amplekse pri „travivaĵo E-seminario" en Bulgario;
— Norddeutsche Neueste Nachrichten, NDPD, 25. 7. 86 pri SEFT 86, 26. 7. 86 raporto pri E-kurso en Pisanica; 15/139 cm

2.12. Potsdam

— Märkische Volksstimme, SED, 3. 2. 86 pac-kontactoj kun japana E-istino, 25. 2. 86 anonco al semajnfina E-kurso, 14. 3. 86 E-korespondado kun tutmondo, 23. 8. 86 2a PoSET, 3. 9. 86 intervjuo pri PoSET 86, 1. 10. 86 detale pri la 71a UK, 8. 11. 86 kaj 11. 11. 86 informo pri intensa E-kurso (Brandenburg), 29. 11. informo pri semajnfina E-seminario;
— Brandenburgische Neueste Nachrichten, NDPD, 23. 6. 86 75a jubileo de LEA, 11. 11. 1986 detala informo pri intensa E-kurso;
— Rechentechnik/datenverarbeitung, n-ro 23/1968 Esperanto por maŝina traduko; 12/130 cm

2.13. Rostock

— Ostseezeitung, SED, 24. 7. 86 informo pri la 71a UK, 4. 8. 86 finita 71a UK;
— Norddeutsche Neueste Nachrichten, NDPD, 3. 4. 86 kondolenco pro morto de Olof Palme al svedaj E-istoj, 28. 5. 86 pri disaŭdigo en E en Radio Polonia, 27. 6. 86 E en la Kulturliga, 28. 7. 86 71a UK komenciĝis, 7. 8. 86 perleteraj E-kontaktoj kun Japanio;
dio Polonia;
— Der Demokrat, CDU, 23. 7. 86 pri E en Ra-
— Unser Podium, SED, Inĝeniera Altlernejo Wismar, n-roj 13, 14, 15, 16 tre ampleksa prezentado de E el diversaj vidpunktoj;
— Norddeutscher Leuchtturm, semajnfina suplemento, 31. 10. 86 tutpaĝe pri la E-movado en la norda distrikto (bildo), 28. 10. 86 pri E-movado; 14/336 cm

2.14. Schwerin

— Schweriner Volkszeitung, SED, 8. 3. 86 anonco de E-kurso;
— Norddeutsche Zeitung, LDPD, 12. 9. 86 pri internaciaj amikaj rilatoj per E, 5. 4. 86 detala artikolo pri E en Radio Polonia;
— Der Demokrat, CDU, 19. 4. 86 E-renkontiĝo de la nordaj distriktoj, 16. 9. 86 pri internaciaj amikaj E-rilatoj, 29. 11. 86 pri E-pacmovado; 16. 11. 86 kaj 18. 10. 86 E-dialogoj; 8/180 cm

2.15. Suhl

— Freies Wort, SED, 1. 3. 86 detala anonco pri E-aranĝo, 13. 3. 86 pri Turingia E-lernejo Ilmenau, 19. 3. 86 IFER 86, 4. 6. 86 informo pri E-lernejo Ilmenau, 28. 7. 86 kaj 4. 8. 86 71a UK;
— Thüringer Neueste Nachrichten, NDPD, 1. 3. 86 pri E-aranĝo, 5. 6. 86 pri Turingia E-lernejo Ilmenau;

— Neue Hochschule, SED, Teknika Altlernejo Ilmenau, 21. 3. 86 amplekse pri E-evoluo kaj disvastiĝo; 9/125 cm

3. Resuma pritakso

1. La nombro de la publikigitaj artikoloj kaj informoj, kompare al la pasinta jaro, iomete stagnis, sume 231 (1985 = 239). Ĉu eble denove la oficejo ne ricevis ĉiujn kontribuojn?
2. La diferenco inter la unuopaj distriktoj daŭras, sed ŝanĝiĝis sekvamaniere: kelkaj distriktaj organizaĵoj fariĝis pli aktivaj, Halle 23 (10), Dresden 21 (2), Karl-Marx-Stadt 22 (11). En krampo la nombro por 1985. Erfurt restas ĉe la kapo, kvankam . . . Bv. kompari: Berlin 8 (8), Cottbus 9 (10), Erfurt 39 (52), Frankfurt/Oder 2 (8), Gera 0 (9), Leipzig 9 (8), Magdeburg 5 (10), Neubrandenburg 15 (35), Potsdam 12 (13), Rostock 14 (44), Schwerin 6 (15), Suhl 9 (2), centraj gazetoj kaj revuoj (sen la serio en Der Morgen kaj Der Demokrat) 37 (25).
3. Por ke la pritakso fariĝu pli objektiva, ni aldonis unuafoje informon pri la kolumna longeco de la kontribuoj (po tuta distrikto). Pri Erfurt ni ne havas ekzaktan kvanton.
   La bildo estas interesa: kvankam ekz. Leipzig ne tre ofte publikigis, la enhave altnivelaj kontribuoj estis plej ampleksaj kaj pro tio tre informaj. En la distrikto Cottbus plej ofte aperis anoncoj pri kursoj. Certe ĉi tie la eblecoj ne estas elĉerpitaj veki la scivolecon de la legantaro pri Esperanto.
4. La tendenco daŭras, ligi varbadon por E-kursoj kun informado pri E kaj E-agado en la distrikto resp. subdistrikto. Pli ofte aperis artikoloj, parte ampleksaj, el kiuj la legantoj eksciis interesajn faktojn pri la movado, la kontribuo de la GDR-Esperantistoj al pacagado kaj interpopola amikeco. Jam ofte oni aldonis informojn pri la lingvo mem kaj sia kreinto.

Mallongigoj

SED =
germana mallongigo por Socialisma Unuiĝinta Partio de Germanio
CDU =
Kristan-Demokratia Partio de Germanio
LDPD =
Liberaldemokratia Patrio de Germanio
NDPD =
Nacidemokratia Partio de Germanio
FDGB =
Libera Germana Sindikata Ligo
FDJ =
Libera Germana Junulara
UK =
Universala Kongreso
IFER =
Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo
SEFT =
Somera Esperantista Familia Tendaro
PoSET =
Potsdama Somera Esperantista Tendaro
IMEK =
Internacia Medicina Esperanto-Konferenco
LEA =
Laborista Esperanto Asocio (ĝis 1933).

Ingrid Mewes

Serio de Levsen 1986

La taggazeto „Der Morgen" (La Mateno), organo de la Liberal-demokratia Partio de Germanio (LDPD) ankaŭ 1986 daŭrigis sian Esperanto-serion per jenaj 20 kontribuoj:

603, 3. 1. 86
Wenn der Arzt fragt (2)
Hilfen zur touristischen Konversation

604, 17. 1. 86
Phänomen Plansprache. Ein Buch aus dem Akademie-Verlag

605, 28. 3. 86
Resolution zum Jubiläum. UNESCO-Generalkonferenz gab Empfehlungen

606, 28. 2. 86
Esperanto auf chinesisch. Der nächste Weltkongreß in Peking

607, 14. 3. 86
Kein Dorn im Auge. Übersetzungen für deutsche Redewendungen

608, 4. 4. 86
Vom Bringen und Geben. (Redewendungen)

609, 25. 4. 86
Zum 75. Gründungstag. Messetreffen der Esperantisten in Leipzig

610, 8. 5. 86
Vorhaben im Jahr des Friedens. Multilaterales Treffen sozialistischer Länder vereint verschiedene Verbände

611, 23. 5. 86
Dinge der Unmöglichkeit? (Redewendungen)

612, 12. 6. 86
Mit der Tür ins Haus fallen (Redewendungen)

613, 27. 6. 86
Die Feder gut führen (Redewendungen)

614, 11. 7. 86
Den Bock zum Gärtner machen (Redewendungen)

615, 1. 8. 86
Was gilt die Wette? (Redewendungen)

616, 15. 8. 86
Da sträubt sich ja das Haar (Redewendungen)

617, 29. 8. 86
Kongreß mit 53 Ländern. Plansprache genießt in China Aufmerksamkeit

618, 26. 9. 86
Vielgestaltige Zusammenkunft. Weitere Informationen über den Weltkongreß in Peking

619, 10. 10. 86
Esperanto auf chinesisch. Neue Werke aus Peking in der Plansprache

620, 31. 10. 86
Mit Haut und Haaren (Redewendungen)

621, 14. 11. 86
In hellen Haufen (Redewendungen)

622, 28. 11. 86
Geschwindigkeit keine Hexerei (Redewendungen)

623, 12. 12. 86
Sie bleibt eine alte Jungfer (Redewendungen)

Semajno de intensiva lernado

En la jaro 1987 mi partoprenis unuafoje intensivan kurson. Ĝin organizis la distrikta estraro de GDREA Potsdam en Bollmannsruh, proksime de Brandenburg. En la grupo B, kiun gvidis la bulgara esperantisto Kunĉo Valev, ni ĉiuj devis paroli en Esperanto, ĉar li apenaŭ parolis la gemanan. Estis interesaj homoj, kun kiuj mi konatiĝis. Ekzemple la inĝeniero Egon el Cottbus, kiu jam mem gvidas kurson. Alfred el Schlieben estas instruisto en entrepreno por agrikultura tekniko. Ĉiujare li prelegas antaŭ la metilernantoj pri Esperanto. Jam aktivulo kaj flue parolanta estas Reiner el Anklam. Sed ankaŭ „sole batalantojn" mi trovis en la kurso, ekzemple la hejtiston Hasso el Babelsberg, la agrokulturiston Ulrich el Pirna kaj la maŝiniston Werner el Gera. Kaj la kursgvidantoj? Kunĉo Valev el Bulgario kaj d-ro Josef Pava el Hungario kapablis entuziasmigi. Al ili kaj la organizantino Rosen Trenner, grandan dankon! Jam la trian fojon la potsdamanoj organizis similan kurson. La 4-a okazos 1988: 24. — 29. oktobro.

Laŭ Georg Martin

Infana renkontiĝo en Wriezen

La unuan semajnfinon de novembro 1987 renkontiĝis infanaj grupoj el Stralsund, Wittenberg, Schwedt kaj knabo el Seelow en la urbeto Wriezen (vricen), situanta en la Odra marĉejo. Ni Wriezen-aj infanoj kiel gastigintoj penis prepari ĉion bonorde en la lernejo „S. Allende". Fiere ni povis prezenti nian tiean E-ĉambreton. Krome ni informis dum promenado pri la 650-a datreveno de la urbiĝo de Wriezen, donacinte memorajojn, kiujn dediĉis nia urbestro. Rapide ni amikiĝis ludinte kaj kantinte vespere. Dankon al niaj instruistoj Heide Pohl, Gunter Ebert, Dieter Wilke kaj Uwe Siebert por la amuzaj lecionoj. Kvankam la tranokteblecoj estis provizoraj, la atmosfero estis bonega. Se en 1988 ni denove povus renkontiĝi, eble kun pli multe da infanoj el aliaj urboj, ni ĝojus.

Andrea Hippe

Prezŝanĝoj por hungaraj revuoj

GDR-abonantoj pagos ekde 1. 1. 1988 por „Budapeŝta Informilo" kvaronjare 5,85 M (do jare 23,40 M). La revuo aperas 12-foje jare en iom pliampleksigita formo. Ankaŭ la litertipa kaj grafika aranĝoj pliboniĝis. La revuo „Juna amiko" aperos anstataŭ 3-foje nun kvarfoje kaj pro tio kostos kvaronjare 3,10 M (do jare 12,40 M). Ambaŭ revuoj estas aboneblaj ĉe Zentralvertrieb des PZV, Ŭbigauer Straße 4, Falkenberg/Elster 7900.

Duhora rekta disaŭdigo

La 21-an de januaro 1988 la stacio „Berliner Rundfunk" (Radio Berlin) disaŭdigis rektan duhoran programon (0.30 — 2.30 h) pri Esperanto. Interparolantoj kun la redaktorino Karin Köbernik estis Wera kaj Detlev Blanke. Oni krome prezentis 12 titolojn da Esperantomuziko.

„Bulgara Esperantisto" per la poŝto

Ekde 1989 ĉiuj GDR-Esperantistoj povas oficiale aboni la revuon „Bulgara Esperantisto" pere de la poŝto. La revuo estas multflanka, A4-formato, kaj aperas ĉiumonate, 24-paĝa. La prezo por 4 numeroj, kvaronjara abono estas M 9,15.

Mendu la revuon plej malfrue ĝis aŭgusto 1988, por ricevi la revuon ekde 1. 1. 1989. Abonojn mendu ĉe: Post und Fernmeldeamt Falkenberg, Zentralvertrieb d. PZV, 7900 Falkenberg, Uebigauer Str. 4. Indiku la mendonumeron Z 20228.

Nova prezidanto de la Distrikta GDREA Berlin

1987 la esperantistoj organizitaj en la distrikta organizaĵo de GDREA en Berlin, ĉefurbo de GDR, elektis kiel prezidanton Manfred Arnold. Pro malsaniĝo kaj tro da aliaj taskoj Manfred Arnold, kiu ja ankaŭ estas vicprezidanto de GDREA, demisiis de sia posteno. Elektiĝis Helmut Krone, kiu gvidas la distriktan estraron ekde septembro 1987.

Honorinsigno por Horst Bänninger

La ligosekretario pri financoj de Kulturligo, k-do Horst Bänninger, fariĝis 65-jara fine de 1987. Pro lia multa tre konkreta helpo, kiun li donis al GDREA dum pli ol 15 jaroj, la Centra Estraro de GDREA distingis lin per la Honorinsigno de GDREA.

Jubileaj artikoloj haveblaj

Dum la jubilea jaro Esperanto 1987, la gazetaro de GDR abunde informis pri Esperanto. Inter la publikigitaj artikoloj elstaras kelkaj tre ampleksaj en gvidaj gazetoj kaj revuoj de GDR. Fotokopioj de tiuj artikoloj estas haveblaj ĉe la Centra Estraro de GDREA.

Esperantistoj el la regiono Zerbst, anoncu vin!

Por fondi Esperantan subdistriktan grupon en Zerbst, ĉiuj esperantistoj troviĝantaj en tiu regiono kontaktu s-ron Lothar Körner, Postfach 38, Luso 3401

Kun gastoj

Kun eksterlandaj gastoj la 24-an kaj 25-an de oktobro 1987 en Cottbus okazis la 8-a distrikta renkontiĝo de GDREA. Partoprenis 54 esperantistoj, inter ili 7 gastoj el ĈSSR, Hungario kaj Pollando.

HER '87

La 2-a Harca Esperanto-Renkonto okazis de la 9-a ĝis 11-a de oktobro 1987 kun 70 partoprenintoj el 4 landoj.

TEJUR '87

La 4-a Turingia Esperantista Junulara Renkontiĝo [TEJUR] okazis la 10-an kaj 11-an de oktobro 1987 en Eisenach. Partoprenis junaj esperantistoj el diversaj distriktoj de GDR kaj 5 gastoj el ĈSSR, Pollando kaj Hungario.

Distriktaj estroj kunsidis

Por pliefikigi sian laboron, la Centra Estraro de GDREA donas pli da helpo al la agado de la estroj de la distriktaj estraroj. Pro tio regule okazos kunsidoj de la distriktestroj. La unua okazis la 27-an de februaro 1988.

Norbert Barthelmess 1897 — 1987

Forpasis unu el la fondintoj de Sennacieca Asocio Tutmonda SAT, Norbert Barthelmess, kiu naskiĝis la 19-an de februaro 1897 en Düsseldorf, mortis en Parizo, la 30-n de novembro 1987.

Forpasis Richard Rabenalt

Unu el la unuaj membroj de la iama Centra Laborrondo Esperanto, la prezidinto de la Distrikta Laborrondo Potsdam, k-do Richard Rabenalt, forpasis la 28-an de decembro 1987. Li estis aktiva membro de la iama GLEA. Ni konservos al li dignan memoron.

Ce de GDREA

Albanio

Bahri Peraj, No. 72, Shenqjin — Lezhe, dez. kor. tutmonde p. ĉ t.

Brazilo

44-jara instruisto de angla lingvo dez. kor., kol. bk: Ivanio Lemos Lisboa, Postal Box 897, 79100 Campo Grande = MS.

Ĉeĥoslovakio

Komencantino, 26j., dez. kor. kun geesp. el GDR pri muziko, jogo, kol. bk, folklorajn kantojn: Dana Šilhánková, nábr. 1. Svobody 8, 110 000 Praha 1

Komencanto, 23j., dez. kor. pri vojaĝoj, kino, motoroj: Tony Grufík, Vacenovice 566, 696 06

Ĉinio

19j. studento dez. kor. kun gejunuloj pri sporto, lingvoj, muziko, kutimoj, kol. pm: Wu jian Guo, P. O. Box 603, the Xinjiang Institute of Finance and Economics, Urumqi

30-jara bibliotekisto- Zhang Liping, Room 173, 43 Jinshan Road, Shanghai, 200080. Interesoj-filatelo, muziko, fotoj de belaj virinoj, sporto kaj literaturo.

Francio

61j. pensiulino dez. kor. tutmonde, p. ĉ t.- Jeanne Sicot, 4 Passage du Moulinet, 75013 Paris

GDR

Faklaboristo, 39j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Manfred Drobusch, Grebser Str. 47, Prützke, 1801

Edith Ulmer, Fr.-Engels-Str. 10, Ruhland, 7800, dez. kor. tutmonde pri vojaĝoj, migrado, sporto, skolo, E-movado

42j. oficisto dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Uwe Hübner, Frankendamm 16, Stralsund, 2300

Dez. interŝanĝi fervojtemajn bk tutmonde: Horst Theurich, Kiefholzstr. 151 A, Berlin 1195

Mario Walter, Horstweg 4, Saalow 1631, (26j.) dez. kor. tutmonde pri literaturo, sporto, kol. futbalbroĉpinglojn, esperantaĵojn

Birgit Weser, Rosa-Luxemburg-Str. 1b, Coswig 8270, (27j.) dez. kor. tutmonde pri muziko, lingvoj, kulturo

Infangrupo, 10j. knabinoj, dez. kun eksterlandaj infangrupoj pri bestoj, sporto, kantado k. s. Skribu al: Dieter Wilke, Am Stadtpark 2/421, Schwedt 1330.

Komencanto, 22j., dez. kor. pri arto, politiko, filozofio: Dirk Bindmann, Max-Benkwitz-Str. 34a, Zeitz 4900

Torsten Wolff, Kirchstr. 114, Pf. 116, Kr. Rochlitz 9291, (22j.) dez. kor. tutmonde pri muziko, literaturo, kol. bk

Manfred Striewsky, Bruno-Taut-Ring 66, Magdeburg 3038, dez. kor. tutmonde pri muziko, sporto, ĝardenkulturo, kol. bk

Hungario

Komencanto, 18j., dez. kor. kun knabinoj 14—18j.: József Kovács, Magyarország, Hatvan, Béke ut. 52, 3000

Irlando

17j. studento dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Anthony Kelly, II, Heather Grove, Ballybane, Galway.

Kubo

Elektro-inĝeniere, 38j., dez. kor. tutmonde pri E-movado.

Ne kolektanto: Raúl Guzmán Isla, Capdevila 360, entre M. A. Núnez y Artola, Camagüey 2

Dez. kor. kun samaĝul(in)oj 12j. Kuba knabino: Adanis Velazquez Edif. 310, Apto 9, Ciudad Camilo Cienfuegos, Habana del Este, Habana 17, Habana

Dez. ligi kontaktojn kun E-grupo de GDREA: José Ramón Cabrera, Calle 66, No 29 A O 4 entre 29 A y 29B, Buena Vista, Playa, Habana

Dez. kor. geedza paro Ana Dora Rodriguez Pérez kaj Néstor Pérez Vestía. Estrada Palma Nr. 106, e plano y Loz Caballero, Santa Clara, Villa Clara

Dez. kor. Leonardo Blanco, Calle J. Nr. 112 Entre Morro Y 23, Cojimar, Habana

Dez. kor. José L. Valdés G., Apartado 25, Jatibonico, Sancti-Spiritus

Dez. kor. Rafael Sanzo, Edificio 3, Apto. 3 Reparto Román, Sancti-Spiritus

Kuba E-grupo dez. kor.: Direccion Provincn de Esperanto, Apartado Nr. 161, Manzanillo, Granma

Dez. kor. Pedro del Rio, Calle: Calixto Garcia Nr. 6, e/Carmen y B. Gonzalez, Remedios, Villa Clara

---

Herausgeber: Kulturbund der DDR
Redaktion: Otto-Nuschke-Str. 1, Berlin, 1080
Fernruf: 2 82 63 43
Verantw. Redakteur: Dr. sc. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Joachim Schulze. —
Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. —
Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckerei Aue, 9400 Aue,
Artikel-Nr. (EDV) 7928 3 2 16